



Svisa Esperanto-Societo

# informas

jaro 2012 numero 1-a: septembro 2011- aprilo 2012  
dissendo je la fino de marto



Fotis Andrée Gacond la 28an de aŭgusto 2011.

Migrado en ĵurasa torfejo kvazaŭas promenadon en fora nordo. Sub bluega ĉielo ekaŭtuna tion entuziasme malkovris la partoprenintoj al la festo de la 27a de aŭgusto, kiuj ne tuj forveturis hejmen. Pluraj el ili eĉ revenis en la valon de La Sagne por vidigi al familianoj aŭ amikoj la marĉan sovaĝejon de Les Ponts-de-Martel. Ili prave aprezis la klarigan padon, kiu ebligas intimiĝi kun borealaj betul- kaj pin-arbaroj daŭre mortigataj de la akvozaj sfagnoj, muskoj kies kresko kaj amasiĝo kreas torfon.

# Rememorigilo

## *SES informas*

### Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils 14,  
CH-2300 La Chaux-de-Fonds  
Retpoŝto : gacond@bluewin.ch  
Tel. : hejme: 032 926 52 32  
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:  
Nancy Fontannaz, Stefano Keller,  
Richard kaj Martine Schneller

## Redaktaj datlimoj

**2012-2 : majo-junio :**

maje 10, dissendo 1-an de junio.

**2012 3 : julio-oktobro :**

julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.

**2012-4 : novembro-decembro :**

oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.

**2013-1 : januaro-februaro :**

decembre 15, dissendo 10-an de januaro.

## Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj

Fr. 25 | nura abono al *SES informas*

## SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue  
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj  
079 69 709 66.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.  
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto :  
[info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch)

Stefano Keller, sekretario, CP 6034, 1002  
Lausanne. Tel.: 076 261 06 09. Retpoŝto:  
kellerstefano@gmail.com

Marie-Louise Mûnger, Rue Centrale 4, 2112  
Môtiers. Tel. : 032 861 26 28.

Retpoŝto : [ml.munger@bluewin.ch](mailto:ml.munger@bluewin.ch)

Nelida Weidmann González, respondeca por  
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,  
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

### *Kontonumeroj de SES (POSTFINANCE)*

**Svisa Esperanto-Societo**  
**2300 La Chaux-de-Fonds**

**Ĉefa konto 17-581908-4**  
(por kotizoj kaj donacoj)

**VASTE kaj DIGNE 12-128564-4**  
(por subteni informadon-varbadon)

Komisiito pri financoj : Hans-Werner  
Grossmann, Esperanto-Servo, PF 262, 4132  
MuttENZ. Tel. : 076 460 89 92.

Retpoŝto: [esperanto-servo@bluewin.ch](mailto:esperanto-servo@bluewin.ch)

**Konsultu la retejon de SES !**

[www.svisa-esperanto-societo.ch](http://www.svisa-esperanto-societo.ch)



# Vivo de SES



2012-1 • Redaktis: Stefano Keller

Kunvoko al la  
**Ĝenerala Kunveno de  
Svisa Esperanto-Societo (SES),**  
okazonta  
*sabate, 28an de aprilo 2012  
en Vevey (VD),  
Restoracio de la Haveno (Restaurant du Port)*

**Tagordo:**

- 1) Bonvenigo, nombrado de ĉeestantoj, anonco pri senkulpiĝoj.
- 2) Elekto de voĉnombrantoj.
- 3) Aprobo de la tagordo.
- 4) Evoluo de la membraro.
- 5) Aprobo de la protokolo de la Ĝenerala Kunveno 2011.
- 6) Vivo de la societo: aprobo de la estrarraporto
- 7) Statutŝanĝo: artikolo 24 (vidu noton).
- 8) Financoj: Prezento kaj aprobo.
- 9) Elekto de kaskontrolantoj.
- 10) 2012: 125-jariĝo de Esperanto. Projektoj por tiu jubilea jaro :
  - a) re-aperigo de « La Fenomeno Svislando » de Arthur Baur.
  - b) diversaj prelegoj en CDELI organizotaj de Claude Gacond.
  - c) aliaj jubileaj agadoj.
- 11) Aliaj aktivecoj por 2012:
  - a) Grundtvig-projekto,
  - b) Tutmonda sesio de KER ITK ekzamenoj,
  - c) Postsomera kunveno.
- 12) Evoluo de la rilatoj inter SES kaj KCE (vidu noton).
- 13) JES (junuloj), SIS (Svisa ILEI sekcio), SFERO (familia renkontiĝo), SAT, SATamikaro, Pasporta Servo k.s. Raportontoj bv. anonci sin al la sekretario de SES, Stefano Keller, aŭ al Mirejo Grosjean antaŭ la kunveno.
- 14) Buĝeto 2012: Prezento kaj aprobo.
- 15) Diversaĵoj.

## Proponoj

Proponoj de membroj pri tagorderoj devas atingi la sekretarion de SES, Stefanon Keller, aŭ la prezidantojn, Mireille Grosjean aŭ Dietrich Weidmann ĝis la 5a de aprilo 2012. Proponoj devas esti subtenataj de minimume tri personoj.

### Noto pri tagordero 7

« Art. 24 - Rilatoj kun UEA  
*Svisa Esperanto-Societo estas landa asocio de Universala Esperanto-Asocio (UEA). La membroj de SES, kiuj ne deziras esti registritaj kiel aligitaj membroj de UEA, povas efektivi tiun deziron per skriba peto al la kasisto de SES.* »

UEA ekrilatis kun la estraro de SES fine de 2011 kaj atentigis, ke fakte tiu dua frazo ne kongruas kun la rilatoj inter UEA kaj landa asocio. Pro tio la estraro de SES proponas forigi ĝin.

Art. 24 (NOVA) :

« *Rilatoj kun UEA*  
*Svisa Esperanto-Societo estas landa asocio de Universala Esperanto-Asocio (UEA).* »

### Noto pri tagordero 11

La estraro de SES pripensis pri evoluo de la rilatoj inter SES kaj KCE kaj faras al la membraro de SES jenan proponon :

*Iompostioma nuligo de la ŝuldo de KCE al SES*

Mirejo Grosjean trovis la protokolon de la Ĝ.A. de 1997, kie estis decidite lasi 15'000 CHF al

KCE kiel pruntedonon. Tiam estis pruntedono sen interezo por 5 jaroj. Do en 2002 (Ĝ.A.) venis la decido, ke la prunto restu sen iu difinita tempolimo, KUN interezo, sed tiu interezo estu donacita. Tio aperas en niaj financaj raportoj kaj en la financaj raportoj de KCE. Tiam estis decidite, ke repago estu postulata kun sesmonata antaŭinformo (laŭ letero de SES al KCE je 2002-04-13).

Ni povas konstati, ke nia (SES) membreco, partopreno kaj voĉdonrajto ĉe KCE tute ne dependas de financaj ligoj. Svisa asocio rajtas havi delegiton en la Kultura Komisiono de KCE (membro A), se ĝi plenumas jenajn kondiĉojn : havas juran sidejon en Svislando, uzas Esperanton, regule informas KCE-n pri siaj aktivecoj, havas presitan leterpaperon, poŝtkonton en Svislando kaj tripersonan estraron (laŭ la statuto de KCE, kun lastaj modifoj de 2003-03-29)

La estraro de SES proponas jenan strategion al sia Ĝenerala Asembleo en la jaro 2012 : a) ĉesi la librotendajn skribaĵojn pri la interezoj ; b) organizi iompostioman nuligon de la ŝuldo. Ĉiun jaron KCE repagu mil CHF kaj ricevinte ilin SES malkreskigu la ŝuldon je mil CHF. Se tia agmaniero estos decidita dum la Ĝ.A. de 2012, la unua tia pago/donaco povus okazi septembre 2012 kaj en la sekvantaj jaroj januare. Dum la lasta jaro la pago estu je 500 CHF kaj same la donaco. Post ok jaroj, do en 2019, la ŝuldo estos nuligita.

- - -

# *Taga programo, Ĝenerala Kunveno de SES en Vevey, la 28an de aprilo 2012*

## **Lokoj**

Bonvenigaj vortoj kaj ekspozicio : *Magasin du Monde*, rue du Conseil 20  
Tagmanĝo kaj asembleo: *Café du Port*, rue d'Italie 23.

## **Horaro**

- Ĉirkaŭ la 10-a horo alvenas trajnoj el Laŭzano kaj ankaŭ el Valezo.
- Je la 10-a horo « Bonvenon ! » antaŭ la stacidomo de Vevey.
- Piede ni kune atingos la vendejon "Le Magasin du Monde". Tie okazos aperitivo kaj prezentado de la ekspozicio.
- Piediro borde de la lago ĝis la restoracio, Café du Port.
- 12a horo : tagmanĝo.
- 14a horo : Ĝenerala Kunveno de SES.
- 16a horo kaj duono : laŭvola urba vizitado.
- Vespermanĝo: laŭ via propra elekto.
- 20a horo : spektado de filmo. Plano A : filmo de Dominique Gautier pri Esperanto, plano B : « Le Dictateur » de Charlie Chaplin.

## **Detaloj**

La tagmenuo kostas po 30.- CHF persone, sen trinkaĵoj. Mendu jam nun, pagu surloke.

Bonvolu elekti el jenaj tri menuoj:

- 1) Verda salato, fiŝa fileo, vaporterpomoj aŭ frititaj terpomoj, glaciaĵo.
- 2) Verda salato, rozmarinrostita bovido, frititaj terpomoj aŭ pastaĵoj, glaciaĵo.
- 3) Verda salato, fungoj sur rostita pano, glaciaĵo.

Por tranokti, ne tro multe kostas, eblecoj estas:

"Riviera Lodge", Place du Marché, tel. 021 923 80 40

"Hôtel Abaca", Avenue de Gilamont 56, tel. 021 922 22 70, fax 021 922 22 76

"Pension famille Burgle", rue Louis Meyer 16, tel. 021 921 40 23

Atentu, ke sabate matene, okazas bazaro sur "La Place du Marché". Se vi venas automobile, serĉu parkejon pli malproksime.

Por aliĝi al la taga programo kaj mendi la menuon, bonvolu tuj kontakti :  
Charlotte Blanc Maillard, Avenue Nestlé 9, 1800 Vevey,  
tel. 021 922 34 74 aŭ 079 393 32 63, retadreso : [kionova@bluewin.ch](mailto:kionova@bluewin.ch)

*Elkore. Ĝis baldaŭ ! Charlotte Blanc Maillard kaj Sonia Daubercies*



## *Svisa Esperanto-Societo*

### *Jarraporto pri la jaro 2011*

#### **Membraro**

SES nombras 164 membrojn je la fino de la jaro 2011. Inter ili estas 12 junuloj. Malaperis 12 membroj pro malaliĝo aŭ ne-repago de kotizo. 3 novaj membroj aliĝis. Ni bonvenigas ilin.

Honoraj membroj de SES estas Lucienne Dovat kaj Claude Gacond. Mortis en februaro 2011 s-ro Carlo Nicolodi en Bazelo; en novembro 2011 s-ro Driss Zerdani en La Chaux-de-Fonds. Li estis membro de Svisa Bahai Esperanto-Komitato. S-ino Georgette Gaussen, bahaano, forpasis en Château-d'Oex.

#### **Financoj**

15 personoj fariĝis patronoj de SES pagante la duoblon de la normala kotizo. Entute estas nun 7 dumvivaj membroj de SES.

Mirinde alta estas la suma donacaro dum 2011: pli ol 1'280.- CHF. Sur nian konton VASTE KAJ DIGNE venis 330.- CHF por subteni adekvatan informadon. En la konto FESTOLIBRO GACOND sumiĝis 3'713.- CHF por akiro de la libro kaj por subteni la okazigon de la festotago, kiu estis tasko de SES.

Niaj membroj estas malavaraj kaj deziras helpi al niaj aktivecoj. Ni ege dankas al ili.

#### **Aktivecoj**

La estraro kunvenis la 8an de januaro en Bielo kaj la 16an de novembro en Uster.

La 26an de marto okazis ĝenerala kunveno de SES en Lugano (TI). Partoprenis kvindek da personoj. Du samideanoj venis el Italio. Vespere prelegis Tazio Carlevaro pri monludoj kaj adiktoj tiurilataj.

#### *Festo de Claude Gacond, 27an de agosto*

Pli ol cent esperantistoj ariĝis en CDELI, multaj venis el eksterlando. Antaŭaj kunlaborantoj de Claude, ekzemple Ilona Koutny, Katalin Kováts, faris longan vojaĝon por honori lin. Impresa kunveno! La biblioteka direktoro same kiel la urba prezidanto alparolis la publikon. UEA prezidanto ĉeestis.

Sub la aŭspicio de Svisa Esperanto-Societo kaj de Svisa ILEI Sekcio (SIS), studsabatoj okazadas en CDELI ĉiun trian sabaton de la monato. Ili estas plej bona okazo por lerni la lingvon kaj/aŭ progresi. Fidele kunvenas proksimume deko da gesamideanoj. Instruas tie ĉefe Mónica Molnár, Luko Allemand kaj Nancy Fontannaz. SES-estraro varme dankas ilin. Komuna tagmanĝo arigas la gestudentojn kaj aliajn surlokajn esperantistojn en agrabla etoso.

Same okazadis la kulturaj seminarioj en CDELI en La Chaux-de-Fonds. Prelegis Claude Gacond kaj aliaj. En CDELI ankaŭ eblas aĉeti librojn, lernolibrojn, vortarojn, k.s. CDELI estas nia libroservo.

Ĉiun vendredon laboras en CDELI Nancy Fontannaz. Same regule, la ĵaŭdojn laboras en CDELI Martine Schneller. Stefano Keller kunlaboras tie regule en la kreado, aktualigo de la retpaĝoj de la Asocio Amikoj de CDELI, [www.cdeli.org](http://www.cdeli.org), kaj en prilaborado de arkivaĵoj. Gratulon kaj dankon al ili.

## **Informado**

*Al la ekstera mondo* : Gazetaraj komunikoj : Agotago oktobra - komuniko pri ZEOJ kun ligo al blogo kun fotoj. Mirejo Grosjean laŭbezone sendas rapide gazetaran komunikon per la reto. Paralele Dietrich Weidmann agadas en Alemanio. Ankaŭ la sekretario, Stefano Keller okupiĝas pri perreta gazetara informado.

Por pli intense informi pri Esperanto SES kreis apartan konton VASTE kaj DIGNE 12-128564-4. Pripensu kaj agu laŭ viaj ebloj!

Por vastskale informi la publikon pri la studsabatoj en CDELI, Mireille Grosjean kreis afiŝojn kaj metis ilin, respektive sendis ilin tra la kantono de Neuchâtel ĝis Delémont, Saint-Imier, do al najbaraj lokoj. Rezulto de tiu informado al publiko vidiĝas. Kelkaj kolegoj helpis por grafike plibeligi la dokumenton. Ni danku al ili !

Alia maniero informi estas meti en la telefonlibron linion pri Esperanto. Tion oni povas fari nur en la telefonlibro de sia loĝloko. Mireille Grosjean faris tion en la telefonlibro numero 4 por la urboj Le Locle, La Chaux-de-Fonds kaj Neuchâtel kaj sia vilaĝo Les Brenets. Unu anonco kostas jare CHF 21.10. Bv pripensu pri sama agado en via regiono. Ne forgesu meti la vorton ESPERANTO en majuskloj.

Laste aperis : Artikolo en WOZ, de Daniel Stern, la 22an de septembro 2011. Artikolo pri SFERO aperis en Zurisee Zeitung la 17an de oktobro 2011

Artikolo en Tages Anzeiger, de Andreas Kurz, la 17an de oktobro 2011. Tiu artikolo en Tages-Anzeiger estas la unua pozitiva kaj granda artikolo de Tages-Anzeiger pri Espranto en la tuta 125-jara historio de nia lingvo. La du lastaj estas rezulto de gazetara komuniko pri SFERO farita de Mirejo Grosjean.

*Organo, interna informilo al niaj movadanoj :*

Nia organo « SES informas » aperis kvarfoje dum la jaro kun valoraj informoj ne nur pri la vivo de la societo, sed ankaŭ kun kultura enhavo. Aparta numero estis dediĉita al Claude Gacond okaze de lia okdekjariĝo. Ni elkore dankas al la redaktoroj Claude Gacond, Nancy Fontannaz, Richard Schneller kaj Stefano Keller, kaj al la pretiganto de la dissendaĵoj, André Sandoz.

## **Retejo**

SES havas retejon : [www.svisa-esperanto-societo.ch](http://www.svisa-esperanto-societo.ch) - ĝi estas prizorgata de Stefano Keller. Krome, Luko Allemand akceptis la taskon « nutri » la retejon regule pri okazontaĵoj. Luko laboras bonege kaj akurate. Bv legi la paĝon [www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro](http://www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro). Ni ege dankas al ili.

### **Retlisto « svislando »**

Estas je nia dispono retlisto. Per la enketo de SES en 2010 pluraj personoj aliĝis al tiu retlisto. Per ĝi oni povas rapide anonci ion. Se vi deziras membriĝi, bv. kontakti nian sekretarion, Stefanon Keller, kiu prizorgas ĝin.

### **Retejo « LERNU.net »**

612 personoj (2012-01-08) studas Esperanton per tiu retejo en Svislando. Ekzistas la eblo ekrikti kun ili tra *www.lernu.net* mem. Tion Mirejo faris en septembro por anonci la datojn de la studsabatoj en CDELI. Atenta notado de la kontaktoj okazas. Intenco estas rilati ĉiun trian monaton por flegi la kontakton kaj altiri tiujn studentojn al iuj renkontiĝoj.

### **Pasporta servo**

Tiu mirinda reto ekzistas nun kaj papere kaj rete. Luko Allemand fariĝis oficiala svisa peranto. En Svislando 10 personoj pretas gastigi vojaĝantojn. Bv vidi: *www.pasportaservo.org*.

### **Lokaj kaj fakaj grupoj**

Lokaj kaj fakaj grupoj aktive kunvenadas kaj havas sian propran vivon ie kaj tie en Svislando. Por scii pri eventoj, kaze ke vi vojaĝadas en nia landeto, vidu nian organon «SESinformas» kaj esploru nian retpaĝon pri aktualajoj: *www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro*.

La estraro de SES estas tre feliĉa pri tiu bunta agado tra Svislando kaj gratulas kaj dankas la lokajn organizantojn.

SES subtenas finance tutnacion kunvenon. Se vi havas intencon organizi tian eventon, bonvolu turni vin al la estraro de SES, por ke la buĝeto povu esti pretigita adekvate.

SFERO ekzemple ricevas subtenon de SES. Temas pri tutsvisa kaj internacia kunveno de esperantoparolantaj familioj, tamen multaj aliaj personoj aliĝas kaj la grupo vigle komunikas esperante kaj ludas, kantas, migras. En 2011 SFERO okazis en Richterswil (ZH). Dankon al la organizantoj Nelida Weidmann kaj Veronika Pochanke.

Postsomera semajnfino okazis en Lausanne post atenta organizado de Nicole Margot kaj Alain Favre. En bela suna etoso dudekhoma grupo multon eksciis pri tiu urbo laŭ geologia vidpunkto. Plie, Daniel Schöni-Bartoli prezentis per interesege prelego la politikajn strukturojn de Svislando. Ankaŭ tiu semajnfino ricevis subvencion de SES.

Komuna muzikado sonoras foje ie, ĉiam belege. Alemanoj kaj Romandoj komune kantas en Svisa Koruso sub la gvido de Elisabeth Demestral. Tre ĝojiga evento. Estas en Svislando pli ol dek altnivelaj muzikistoj esperantistaj.



## **Junularo**

Laŭ nia scio estas grupetoj da junuloj en diversaj anguloj de nia landeto. Novuloj eklernas... Sed ne ekzistas oficiala aktiveco de JES.

Universala Esperanto Asocio (UEA) : SES estas ĝia landa sekcio. La ligoj estas tre regulaj. Mireille Grosjean reprezentas SES-n ene de la komitato de UEA. Dum UK 2011 en Kopenhago ŝi partoprenis la komitatkunsidojn. Stefano Keller kiel estrarano de UEA multe agadas en rilato kun UEA. En Kopenhago kongresis dudeko da svisoj. Tre agrabla komuna vespermanĝo okazis apud kanalo en gaja etoso. Estas en Svislando 19 delegitoj laŭ Jarlibro 2010 de UEA. Nia ĉefdelegito estas Francisko Randin el Lausanne. Pri UEA vidu *www.uea.org*

## **SAT**

Estas en Svislando 7 membroj de SAT. Richard Schneller respondecas pri SAT en nia lando. Estas en Svislando 3 membroj de SATamikaro. Mireille Grosjean respondecas pri SAT-amikaro en nia lando. Pri SAT kaj SAT-amikaro vidu *www.esperanto-sat.info*.

## **Unuiĝintaj Nacioj (UN) en Ĝenevo**

UN havas sian ĉefan eŭropan sidejon en Ĝenevo. UEA estas Ne-Registara Organizo (NRO) en oficialaj rilatoj kun UN. En 2011 reprezentis UEA-n en Ĝenevo Stefano Keller kiel ĉefreprezentanto, Nicole Margot, Cesco Reale kaj Charmian Common. Bv vidi *www.lingvaj-raĵtoj.org*

## **Internaciaj kontaktoj**

Private multaj el niaj membroj vojaĝas al UK, al aliaj landoj. En Lugano por nia Ĝenerala Kunveno venis du personoj el Italio. Plie ni povis konatiĝi kun tiĉinanoj. En septembro venis al Svislando s-ro James Rezende Piton, ĉefdelegito de Brazilo. Li venis pro partopreno en profesiaj kongresoj. Li restadis dum 2 tagoj en La Chaux-de-Fonds.

## **Projekto Grundtvig**

Komence de la jaro la estraro jesis pri propono partopreni Grundtvig-projekton. Tiu strukturo nestas ĉe Eŭropa Unio. Tamen Svislando rajtas partopreni, ĝi eĉ ricevis gvidan rolon. La temo de la kunvenoj estas «interkultura edukado» kaj rilatas al plenkreskuloj. Lukto kontraŭ rasismo, kontraŭ diskriminacioj, harmonia kunvivado - jen nia labortemo. La projekto daŭros ĝis somero 2013. La unua renkontiĝo okazis dum SFERO en oktobro 2011 en Richterswil (ZH). La vojaĝkostoj al eksterlando estas pagataj pere de mono de Eŭropo. La venontaj renkontiĝoj okazos dum Pasko en Bonn, dum Penteksto en Berlino, 17a-20a de majo en la Kvinpetalo: Edukado al interkultura komunikado kun Kristin Tytgat el Belgio. Bv anonci vin ĉe Mirejo Grosjean se vi volas aktive partopreni en la projekto, via vojaĝo al Germanio kaj/aŭ Francio estos repagota!!

## **Pozitiva politika evoluo en la neŭŝatela regiono :**

Leĝpropono estis deponita januare 2011 en la parlamento de la urbo La Chaux-de-Fonds : oni traduku partojn de la retejo de la urbo al Esperanto. La leĝpropono estis akceptita en septembro 2011. Memorenda estas la pozitiva decido de la neŭŝatela kantona parlamento en februaro 2009 « Valorigi Esperanton ».

## **Diversaĵoj**

En januaro venis al SES ampleksa enketo el la zurika universitato; esplorlaboro okazas tie kun subteno de Nacia Fonduso por scienca esplorado. La celo estas esplori, kiomgrade la asocioj kaj interesgrupoj sukcesas uzi la modernajn komunikilojn kaj kiel ili sukcesas rilati kun amaskomunikiloj, gazetaro, radio kaj televido. Ni detale partoprenis tiun enketon.

En februaro venis enketo al SES el la Berna universitato el la fakultato pri ekonomio kaj sociaj sciencoj. Ni detale partoprenis tiun enketon.

La 25-an de februaro 2011 Mirejo Grosjean vizitis la Svisan UNESCO-komisionon en Berno. Temo : jardeko de lingvoj. Ne venis pozitiva reago.

Kontakto kun Maison d'Ailleurs, Yverdon, kiu gastigas salonon pri Jules Verne. Mirejo donacis al tiu stablo ĉiujn verkojn pri Jules Verne kaj Esperanto kaj ĉiujn tradukitajn verkojn de Jules Verne en esperanto. Du aliaj «ŝatantoj» de Jules Verne ricevis la dulingvan libreton «Jules Verne espérantiste»: Sinjoro Michel Faillettaz, ĝenerala konsulo de Svislando en Lyon kaj Sinjoro Didier Burkhalter, federa konsilanto.

En la filmo « Le Dictateur » de Chaplin aperas vortoj en Esperanto sur la stratoj. Rilate al la agado en Vevey en aprilo 2012 la organizantoj kontaktis diversajn instancojn. Okazis kontakto kun «La Cinémathèque Suisse» (kinoteko en Lausanne) kaj kun du kinartaj fakuloj por trovi iun citaĵon de Charlie Chaplin pri Esperanto. Klopodo kontakti la Chaplin Fondumon en Parizo restis sen sukceso, ŝajne tio ne ekzistas.

## **Konklude**

Legante tiun raporton vi povis observi, ke multaj diversaj personoj agadas en Svislando kaj transprenas taskon, kiu rilatas al ilia kapablo, emo, eblo. Tio estas tre pozitiva fakto, signo de sana, vigla movado. La estraro de SES elkore dankas ilin.

*Les Brenets. 2012-02-08*

*Nome de la estraro de SES  
Mireille Grosjean kaj  
Dietrich Weidmann*



## *Jarkalkulo 2011 - bilanco 31.12.2011 - buĝeto 2012*

			31.12.2011	
1010	Poŝtkonto (17-581 908-4)		1'424.39	
1011	Poŝtkonto e-deposito (92-7737-1)		30'203.50	
1060	Prunto al KCE		15'000.00	
1090	UEA konto sesa-v (€ 10.19 je 1.25)		12.75	
1100	Inventaro		649.00	
1150	Bonhavo che ESTV: Antaŭimposto		209.00	
	<b>Aktiva sumo</b>		<b>47'498.64</b>	
2000	Transaj pasivoj		55.00	
2100	Kapitalo 1.1.2011 50'524.02 minus plielspezoj 2011 3'080.38 = kapitalo 31.12.2011		<b>47'443.64</b>	
	<b>Pasiva sumo</b>		<b>47'498.64</b>	
		2011	Buĝeto 2011	Buĝeto 2012
3000	Informado, varbado	1'745.25	5'000.00	2'500.00
3010	Laborrimedoj, omaĝoj	324.60	200.00	200.00
3020	Subvencioj, premioj, projektoj	1'170.70	900.00	1'500.00
3110	SES informas	1'662.25	3'000.00	3'000.00
3120	Kunvenoj kaj kunsidoj (ĜK, estraraj, regionaj)	495.90	900.00	900.00
3200	Kotizoj al UEA, EEU, ktp.	281.85	250.00	250.00
3210	Administrado (afrankoj, telefonkostoj, ktp)	285.45	400.00	400.00
3220	Bank- kaj poŝtspezoj kaj kurzdiferencoj	79.10	100.00	100.00
3230	Donaco al KCE	450.00	450.00	450.00
3300	FESTO/FESTLIBRO Claude Gacond	4'767.73		
3310	Reeldono "La Fenomeno Svislando"			9'500.00
3320	Agado 125			1'500.00
3500	Diversaĵo	278.00	300.00	300.00
	<b>Elspeza sumo</b>	<b>11'540.83</b>	<b>11'500.00</b>	<b>20'600.00</b>
4200	Membrokotizoj	5'490.00	5'000.00	5'000.00
4210	Abono al SESi sen membreco	575.00	500.00	500.00
4300	Donacoj, heredaĵoj	1'610.00	1'500.00	1'500.00
4600	Interesoj: bankaj, poŝtaj kaj de KCE	785.45	750.00	650.00
	<b>Enspeza sumo</b>	<b>8'460.45</b>	<b>7'750.00</b>	<b>7'650.00</b>
	<b>Plielspezoj</b>	<b>3'080.38</b>	<b>3'750.00</b>	<b>12'950.00</b>

## ***Partopreno de SES en la Grundtvig-projekto (EU) Jarkalkulo 2011***

Konto		Malfermo	Debeto	Kredito	Saldo
		01.01.2011			31.12.2011
1010	PostFinance baza konto		15'515.16	805.00	14'710.16
1011	PostFinance EURO konto				
1100	Transaj aktivoj				
	Aktivoj		15'515.16	805.00	14'710.16
2100	Transaj pasivoj				
2200	Kapitalo				14'710.16
	Pasivoj				
3000	Subvencioj pagitaj		805.00		805.00
3010	Makleraĵo				
3020	Administrado				
3021	Kurzdiferencoj				
	Elspezoj		805.00		805.00
4000	Subvencioj ricevitaj			15'509.76	15'509.76
4020	Interesoj			5.40	5.40
	Enspezoj			15'515.16	15'515.16
	Rezulto (plienspezoj)				14'710.16
14.01.2011/H.W.Grossmann					

*Detala librotenada raporto pri la financoj de la Grundtvig-projekto  
estos je dispono dum la Ĝenerala Kunveno.*

### **Partoprenu en la Grundtvig-projekto : IDEO Interkultura edukado!**

Sekva renkonto de la internacia laborgrupo: 2012 aprilo 6-9, Bonn, Germanio. Viaj vojaĝkostoj estos repagitaj! Pri la enhavo de tiu kunveno respondecas Mirejo Grosjean: [mirejo.mireille@gmail.com](mailto:mirejo.mireille@gmail.com)

*Postaj laborkunvenoj de la Grundtvig-projekto:*

majo 17-20: Kvinpetalo, Bouresse, Francio

majo 26-28: Berlino, Germanio

junio 29-julio 1: Canet de Mar, Katalunio

oktobro 19-21: Centro Le Louverain, Les Geneveys-sur-Coffrane,  
Svislando (SFERO)

Pli da informoj: [mirejo.mireille@gmail.com](mailto:mirejo.mireille@gmail.com)



# Svisa kalendaro

Ankaŭ vizitu la retan version de la kalendaro prizorgata de Luko Allemand  
[www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro](http://www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro)

## Aprile

- 2 : Vevey : LES-Kunveno, ekspozicia preparo.
- 21 : La Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 28 : Vevey : Ĝenerala Kunveno de SES kaj ekspozicio.
- 30 : Basel : ESB-Kunveno en Saint-Louis.

## Maje

- 7 : Lausanne : LES : Diskuto pri la ekspozicio.
- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 19 : La Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 24 : Basel : ESB-Kunveno en Grün.

## Junie

- 9 : Lausanne : LES-Ekskurso.
- 16 : La Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 25 : Basel : ESB-Kunveno en Saint-Louis.

## Julie

- 1 : Redakta datlimo de *SES informas*.

- 14 : Basel : ESB : Nacia festo en Francio.

## Aŭguste

- 26 : Basel : ESB-Ekskurso al Akvofaloj.

## Septembre

- 1 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Digna Festado de la 125a Esperanto-Jubileo.
- 2 : Postfesta intimiĝo kun Ĵuraso.
- 3 : Lausanne : LES-kunveno.
- 8 : Biel : SES-Ŝipveturo al Solothurn kaj vizito de la dinosaŭraj spuroj en Oberwil.

## Oktobre

- 1 : Lausanne : LES-kunveno.
- 10 : Redakta datlimo de *SES-informas*.
- 12-14: SES : SFERO en Le Louverain (NE) .

### Bedaŭras la redaktoroj

Bedaŭrinde la redakta datlimo por la januara-februara numero de *SES informas* 2012-1 ne estis respektita de la SES-Komitato. Nek alvenis la jarraporto de SES, nek alvenis la tag-ordo de la antaŭvidita Ĝenerala Kunveno de SES kaj de la programo de la renkonto en Vevey almenaŭ ĝis la komenco de januaro, kio devigis la redaktorojn rezigni pri la publikigo de la bulteno je la dato antaŭvidita. Tial la bulteno estis prokrastita por anstataŭi la antaŭviditan martan *SES informas* 2012-2 kun la librotenedaj raportoj.

Vere la redaktoroj petas al nepra respekto de la redaktaj datlimoj de la bulteno, kiuj estas anoncigitaj en la kalendaro. La antaŭvidita marta numero pro tio estas prokrastita al majo kun la esperebla raporto de la kunsido de la Ĝenerala Kunveno de SES en Vevey kaj kun detala programo de la venontaj gravaj okazaĵoj. Ankaŭ raportoj pri aliaj okazintaĵoj kaj okazontaĵoj bonvenas. Tiucele la nova redakta datlimo estas je la 10a de majo.

Redaktas : Richard Schneller (rs), Rue Charles-Knapp 20, 2000 Neuchâtel,  
rischneller(ĉe)gmail.com.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

## Rememore al la honoriga festo por Claude Gacond


(27a-29a de aŭgusto 2011)

### Dankemas la festito

La neordinara festo, kiun mi travivis honore al mia okdekjariĝo, certe meritas ne sveni en forgesojn, ĝenerala sorto de tiaj okazaĵoj kun sinsekvo da oratoraĵoj. Tial dankeme al la parolintoj mi deziris, ke iliaj vortoj ne perdiĝu. Tiu postfesta bulteno donas do al ĉiuj la eblon kvazaŭ revivi la manifestacion.

Kulmino al la paroladoj certe estis la *Laŭdacio* de Reinhard Haupenthal, kiam konklude al la manifestacio li prezentis la Fest-libron *Instrui Dokumenti Organizati*, kiun li editoris kun sia edzino Irmi kaj kun la apogo de SES.

Impresiga *Tabula Gratulatoria* listigas la gratulantojn kaj alia listo la sponsorojn. La verkon enkondukas franclingve *Salut-vorto* de Jacques-André Humair, la direktoro de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds, kiu interalie atentigas pri la kvindekjariĝo de la *Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale*. Do ankaŭ iel festiĝis la duonjarcento de CDELI.



Al la festaj paroladoj estas aldonitaj du omaĝoj al la fondinto de CDELI, kiujn prononcis Michel Schlup kaj Loyse Renaud Hunziker dum la funebra ceremonio de Fernand Donzé okazinta en Neuchâtel la 8an de februaro 2011.

En la libro *Instrui Dokumenti Organizi* en la listoj de la gratulantoj kaj sponsoroj bedaŭrinde mankas Lina Gabrielli en Ascoli Piceno (IT), kies kontribuo alvenis dum presatis la verko.

Post la aŭskulto de la festaj paroladoj min ankaŭ vigle impresis la tralego de la 21 kontribuoj aperintaj en la libro. Multaj rememorigas momentojn de mia duonjarcenta esperanto-vivo kaj kunlaborojn, el kiuj rezultis produktivaj agadoj. Kaj videble pluraj interlingvistikaj esploroj ekis en CDELI.

La libro *Instrui Dokumenti Organizi*, kiel cetere la bulteno

*Gacond 80!* disdonita komence de la festo, certe malhelpos svenon en forgesojn de la manifestacio de la 27a de aŭgusto, kiun iniciatis kun sia neordinara viglo Mireille Grosjean. Do ankaŭ al ŝi esprimiĝas mia dankemo.

Sed oni ne forgesu, ke CDELI estas kolektiva agado. Ekde ĝia starto ĝis nun nelacigeble min helpadis kaj ĉiam viglas kunlaborantoj, inter kiuj fidelas mia edzino Andrée. En venonta bulteno mi raportos pri tiuj helpemuloj en historieto de la duonjarcenta CDELI.

*Claude Gacond*

## Laŭdacio de Reinhard Haupenthal

Monsieur le Directeur de la Bibliothèque de la Ville de La Chaux-de-Fonds, cher Monsieur Humair,

estimataj reprezentantoj de la svisa kaj de la internacia Esperantomovado,

estimataj kolegiinoj kaj kolegoj, damoj kaj sinjoroj,

kara Andrée Gacond, tre kara Claude.

Ni kuniĝis ĉi tie, por omaĝi kaj riverenci al viro, kiu, per sia laboro kaj per sia vivo-verko, donis aŭtentan stampon al Esperanto kaj al la tuta internaci-lingva movado, kies materia substrato estas CDELI. Vi, kara Claude, dum via tuta vivo estis plen-sanga pedagogo: instrui infanojn kaj adoltojn iĝis via dua naturo, juniga fonto el kiu vi ĉiam ĉerpis forton. Vi semis kaj semis kons-

tante: kiel Sizifo vidis la esencon de sia laboro en la rulado de la ŝtono, tiel same vi ne lasis vin iriti de eventualaj missukcesoj kaj fiaskoj. Viajn strebojn ĉi-rilate dokumentas pluraj svisaj Esperanto-periodaĵoj. Dank' al ĉi zorga kronikado de la eventoj, nenio dronis en la maro de forgeso. Tio validas ankaŭ por viaj instruopertoj, multaj labor-planoj, via laboro esplora. Tra jar-dekoj vi organizis: jen ski-feriojn, jen Kulturajn Semajn-finojn, jen kolokvojn kaj seminariojn. Efektive, en ĉi tri verboj Instrui Dokumenti Organizi resumiĝas via vasta agado kaj al ili ĉio cetera substitueblas. Ne mirige, ke ili kvazaŭ aŭtomate postulis titoliĝi kiam ekestis la ideo pri festlibro. Mokemuloj avertis, ke la inicialoj de Instrui Dokumenti Organizi formas la vorton „Ido“. Eble ili pretervidis, ke neniam vi havis tuŝo-

timan fobion : en CDELI vi hejmis la idistojn, unu long-jara kunlaboranto via estis occidentalisto kaj ankaŭ la reprezentantoj de Interlingua tiris la ĉapelon pro via praktikata plan-lingva ekumenismo. Ia miriga fato volis, ke vi ludu ĉi rolon kaj ke ĉi rolon vi ludas modele kaj sukcese. Donante al vi la nomon Claude, eble eĉ viaj gepatroj providence kaj subkonscie direktiĝis de ĉi fato. Ĉar kion alian signifas la literoj de ĉi nomo, se ne jenon :

- C = Centre (centro)
- L = Langue (lingvo)
- A = Auxiliaire (helpa)
- U = Universelle (universala)
- D = Documentation  
(dokumentado)
- E = Esperanto

Tiele la lulilo de CDELI najbaris vian propran. (Mi vidas kunŝoviĝon de kajoj sin demandantaj pri la signifo de Gacond : nu, la kabal-

istikan dekodigon de la genetika kodo mi esperas liveri en via... okdekkvinjariĝo.)

La ideo kunplekti por vi, kara Claude, apartan fest-libron tuj trovis spontanen konsenton. Tamen, bedaŭrinde, ies ombroj tro longis por transsalto : pro motivoj ne specife zamenhofaj ili preferis ne enjungi sin. Sed la ĉaro tamen ekiris : estiĝis bunta bukedo da kontribuoj divers-tamaj. Rekte al la jubileulo rilatas la antaŭparolo de Jacques-André Humair kaj la artikolo de Stefano Keller kiu verkis enkondukan eseon sub la titolo „Servoprete via“. Sub mal-facilaj cirkonstancoj Marie-Louise Münger pristudis la humanisman kaj pacifisman pens-manieron de Claude Gacond surbaze de elektitaj radio-prelegoj. Kun la jubileulo mi dividis la taskon kompili la bibliografion de liaj publikigaĵoj.



*Transdono de festlibro kaj festvino fare de Irmi kaj Reinhard Haupenthal*



Nature dominas artikoloj el la sfero de la esperantologio kaj interlingvistiko : Detlev Blanke analizas la revuon *Planlingvistiko*, Tazio Carlevaro parolas pri la Ido-poeto Andreas Juste, Jean-François Fayet prezentas la komplekson pri Kom-intern kaj la Esperanto-demando, Herbert Mayer pristudas fruajn ekzemplojn por la senpera verbigo de adjektivoj kaj substantivoj, Sébastien Moret analizas la negativan sintenon de du francaj lingvistoj : Jacques Damourette kaj Edouard Pichon ; Gonçalo Neves sublupeigas la rilatojn de Zamenhof al Volapük, Josip Pleadin rakontas la historion de la revuo *La Suda Stelo* kaj Annakris Szimkat malkovris artikolon de Adolf Schmidt en kiu, jam en 1931, ĉi lasta parolas pri la inkunabloj de Esperanto.

Pedagogiaj temoj kompreneble ne mankas : Renato Corsetti prezentas al ni mitojn, fortojn kaj malfortojn de la Cseh-metodo, Nancy Fontannaz priskribas la klerigan rolon de CDELI, Ilona Koutny rilatigas verbajn strukturojn kun rimarkoj pri ties instruado, kaj fine Mónica Molnár konatigas nin kun tri iniciatoj de lernejoj korespondoj en Svislando : la entrepreno *Grajnoj en Vento* de Marcel Erbetta, la laboro de Claude Gacond mem kaj la rolo de la lernejo la Granda Ursino, kie ŝi aktivas.

Kelkaj kolegoj okupiĝis pri la biografioj de esperantistaj agantoj : Tomasz Chmielik pri la rolo de Edmond Privat dum la unua mondmilito lige kun la sendependiĝo de Pollando ; Probal Dasgupta pri sia sam-landano Lakshmiswar Sinha kaj

Dietrich Weidmann pri la „fenomeno Baur“. Unu kontribuon mi ŝatas aparte reliefigi : tiun de Katalin Kováts. Malgraŭ sia komenca opono kontraŭ mia tem-propono pri Tiberio Morariu kiun ŝi sentis milda trudo, ŝi ne nur liveris intereso-kaptan artikolon pri la rumana Cseh-instruisto, sed tia-grade profundigis en la materion, ke en majo, en Stokholmo, ŝi povis prezenti en la ĉeesto de la retrovita filino tutan libron pri Morariu. La kromefikoj...

Fine, ne povas manki kontribuoj pri bibliotekoj : Ana María Molera rakontas la historion de la planlingva kolekto de sia patro Ramon Molera, mi mem elmontris la zigzagajn vojojn de la privata biblioteko de Schleyer kiu, pasint-jare, trovis definitivan hejmon en la Bavara Ŝtata Biblioteko en Munkeno.

Kaj iel, last-momente, kvazaŭ ekstervice, Irmi Hauptenthal povis aldoni dokumenton ne nur surprizan, sed rekte sensacian. Ŝi sukcesis akiri leteron de Louis de Beaufront, pri kiu mito-maniuloj asertas, ke lia vera nomo estis Louis Chevreux, al la franca matematikisto Charles Laisant. En ĉi letero verkita iom antaŭ la Bulonja kongreso, la markizo konsiliĝas kun Laisant pri tio, ke Zamenhof estu kandidato por la Nobel-premio por paco.

Tiele kunplektiĝis bunta honor-krono, kiu, espereble, delektos ne nur vin, kara Claude, sed ankaŭ multajn aliajn legantojn.

Mi nun petas la eldonistinon transdoni la unuan ekzempleron al nia jubileulo.

# Alparolo de Jacques-André Humair

Estimata sinjorino deputito,  
Estimata urbestro de La Chaux-de-Fonds,  
Estimata s-ro prezidanto de Universala Esperanto-Asocio,  
Estimataj gesinjoroj kunprezidantoj de Svisa Esperanto-Societo,  
Kara Claude Gacond,  
Gesinjoroj,  
Karaj gastoj, karaj esperantistaj geamikoj,

Nome de la Biblioteko mi kore bonvenigas vin kun aparta ĝojo. Estas tre granda honoro por mi akcepti vin hodiaŭ okaze de la 80a naskiĝdatreveno de s-ro Claude Gacond, fondinto kaj ĉefa motoro de CDELI, honora membro de Svisa Esperanto-Societo, de Universala Esperanto-Asocio kaj de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

La impona konstruaĵo kiu altas super la strato Numa-Droz, en kiu vi troviĝas nun, gesinjoroj, havas longan historion. Ĝi estis inaŭgurita, sub la nomo “Industria kolegio”, en 1876, dum periodo aparte favora por la ekonomio, kiam la horloĝindustrio instigis al progresoj ankaŭ kampe de kulturo kaj edukado. Influis tamen ankaŭ la politikistaro, zorgema konstruigi lernejojn kiel ĉi tiu kolegio. Aparte grave rolis ĉi-kampe unu viro, nome Numa Droz, civitano de La Chaux-de-Fonds, elektita al la Ŝtata Plenuma Konsilio de Neŭŝatelo en 1871, kaj sekve al la Federacia Plenuma Konsilio en 1876.



*Jacques-André Humair*

En ĉi tiu konstruaĵo trovis hejmon ĉio intelekta kaj artisma, kio troviĝis tiam en La Chaux-de-Fonds, urbo tiutempe de 21 000 loĝantoj. Temis pri muzeoj, historio, pentrarto kaj scienco, numismatiko – de tiam ŝanĝiĝis nomoj kaj celaroj, same kiel la biblioteko mem, siatempe ne pli ampleksa ol unu granda salono kun galerio kaj du apudaj lokaloj en la okcidenta alo. Antaŭ ol esti komplete je la servo de la biblioteko kaj de la lernejo de Numa-Droz, la konstruaĵo gastigis, vice, la horloĝistan lernejon fonditan en 1865, kaj la artlernejon por juvelistoj kaj gravuristoj. En ĉi lasta instruis gravaj plibeligantoj de la urbo, nome Charles L’Eplattenier kaj Charles-

Edouard Jeanneret, ĉi tiu poste konata kiel Le Corbusier. Fine, en 1900, ekfunkciis ĉi tie la nove fondita Urba Gimnazio, restonta entute pli ol 70 jarojn.

Nuntempe la Biblioteko okupas pli ol 5000 m<sup>2</sup> sur ses niveloj modernige transformitaj, por ke ĉi tiu publika servo, grava por la urba kultura vivo, povu evolui kaj funkcii laŭ la bezonoj de la 21a jarcento, epoko kiu sendube montriĝos grava turnopunkto en la historio de bibliotekoj. Neniu ja povas antaŭvidi la estontecon de la publikaj bibliotekoj en nia nuna mondo cifereca, skue modifanta kulturajn kutimojn.

Nia institucio, kiel vi scias, elstaras per sia duobla taskaro flegi la lokan kulturan heredaĵon kaj ebligi legadon por la publiko. Longtempe unu tasko superombris la alian, sed nun ni jam kapablas valorigi tiun kulturan trezoron, paperan kaj aŭdvidan, kiu formas gravan parton de la historia memoro de la kantono Neŭŝatelo kaj ties vivo asocia, industria, politika kaj intelekta. Nia institucio alprenis la internaciajn normojn pri arkivado kaj integriĝis en la fakajn retojn. Ĝi partoprenas en naciaj projektoj, kaj helpas disvastigi la lokan kulturan famon trans la limoj municipaj kaj kantonaj, same kiel la famon de sia partnero, la urbo La Chaux-de-Fonds. Via ĉeesto mem, gesinjoroj, bele ekzemplas tiun disvastiĝon, ĉar vi ja deziris partopreni ĉi tiun festan tagon por elmontri vian ŝaton de civitano, kiu vigligas la intelektan kaj kulturan vivon de la horloĝista metropolo.

Malmultaj homoj scias pri la unikaj kolektoj troveblaj ĉe ni, inter kiuj, kompreneble, nepre menciindas la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI), sed, en aliaj fakoj, ankaŭ la biblioteko de la svisa speleologia societo, aŭ la arkivo de Internacia Civila Servo.

La Centro CDELI, gesinjoroj, kiun ĉiu el vi jam vizitis, frekventis aŭ konsultis, festos sian 50-jariĝon en 2017. Ĝi estis fondita en 1967, por ebligi la esploradon, konservadon, klasifikadon kaj studadon de dokumentoj rilataj al la lingvo internacia. Fakte, s-ro Claude Gacond jam en la 60-aj jaroj, kiam li pliaktiviĝis pri Esperanto, ekhavis arkivojn de vere historia valoro. Eblas do diri, gesinjoroj, ke vi estas invititaj al duobla naskiĝtaga festo, tiu de Claude Gacond, kaj tiu de la ekesto de la unuaj kolektoj el kiuj poste elkreskis CDELI mem.

Dum tiuj kvindek jaroj ĉi tiu centro laboradis por envere efektiviĝi la ambiciojn de sia fondinto, Claude Gacond, kaj de la esperantistoj.

Dum kvindek jaroj ĝi evoluigis kaj riĉigis la dokumentaron, vastigis la spacon, akirante pli kaj pli da estimo ĉe la esploristoj, elmontrante plurfakan kreemon en sia agado tre specifa.

Dum kvindek jaroj ĝi funkciis dank' al vico da sinsekvaj volontuloj, eĉ se la Biblioteko, heredanto de longa tradicio de malfermeco, ne domaĝis siajn penojn por garantii la kondiĉojn necesajn por konservi kaj

valorigi ĉi tiun trezoron interlingvistikan.

Dum kvindek jaroj ĝi klopodis fidele sekvi la ŝanĝojn en la fako arkivista, fronte al la defioj de nia plirapidiĝanta epoko.

Mi venas al la fino de mia parolado. La Urba Biblioteko estas memkompreneble tre feliĉa kunfesti kun vi ĉi tiun tagon omaĝan al s-ro Claude Gacond, kiu plu kunkreadas la historion de nia institucio. Ni elkore dankas lin pro lia enorma laboro plenumata por CDELI, tiu ĉi loko pinte kvalita pri arkivado kaj pri dokumentado de la internacia lingvo. Mi dankas ankaŭ lian edz-

inon kaj lian skipon, kiuj senlace laboradis por diskonigi ĉi tiun centron kaj, pere de ĝi, la urbon La Chaux-de-Fonds kaj ĝian Bibliotekon.

Mi varme deziras feliĉan naskiĝtagon kaj longan vivon al s-ro Claude Gacond.

Al vi ĉiuj bonegan tagon. Dankon pro via atento.

*Jacques-André Humair*

Direktoro de la Urba Biblioteko.

*(Elfrancigis István Ertl)*

## **Alparolo de Pierre-André Monnard**

Gesinjoroj,

La nuna tago, la 27a de aŭgusto 2011, donas al ni okazon omaĝi al elstara civitano de La Chaux-de-Fonds, s-ro Claude Gacond, kiu festas sian 80-jariĝon. Vidante lin tiom vigle trairi la stratojn de la urbo aŭ aliri la bibliotekon, oni devus preferi diri, ke ni gratulas lin pro liaj okdek printempoj.

Laŭ la invito, kiun dissendis s-rino Mireille Grosjean, hodiaŭ ĉe estas elstaruloj el la tuta mondo. Mi tre kore bonvenigas ilin ĉiujn kaj permesas al mi, koncize prezenti la urbon La Chaux-de-Fonds, urbon iom neglektatan de cetera Svislando, sendube pro ĝia geografia situo iom ekster la grandaj vojoj de komunikado.



*Pierre-André Monnard*

Kun siaj 37 000 loĝantoj La Chaux-de-Fonds estas la tria urbo de

romanda Svisio, post Genève kaj Lausanne, sed antaŭ Neuchâtel, Fribourg kaj Sion. Ĝi havas riĉan industrian pasintecon, precipe en la sektoro de horloĝoj. Ankoraŭ nun entreprenoj de La Chaux-de-Fonds produktas horloĝojn altrange precizajn, kiuj subtenas la reputacion de svisa kvalito tra la tuta mondo.

Ankaŭ en la kultura kampo nia urbo havas fierindan bildon. Ĝi disponas pri multaj muzeoj dediĉitaj al arto, historio aŭ teknologio. Ĝi aldone ĝuas eksterordinaran situon en plene natura medio, kio kreis la diron, ke Ĵurasanoj metis siajn urbojn inter arbarojn kaj paŝtejojn. Kaj laste, kune kun la najbara urbo Le Locle, ni havis la honoron esti klasita de Unesko en la Monda Heredaĵo de la Homaro.

La Chaux-de-Fonds fieras ankaŭ pro tio, ke ekde 1974 ĝi gastigas la Kulturajn Centron Esperantistan. Pro sia intensa agado kaj la kvalito de siaj gvidantoj, tiu institucio konigis nian urbon tra la tuta mondo. Senlace Claude Gacond kaj liaj kunlaborantoj instruas la lingvon kreitan de Zamenhof, kiun nun parolas milionoj da homoj dise en la kvin kontinentoj, povante per ĝi simple interkomunikiĝi kaj precipe interkompreniĝi.

Komence de la 20a jarcento, iuj horloĝistaj entreprenoj de nia regiono deziris trovi varnomon, kiu estu universala kiel la latina sed moderna. Ili elektis Esperanton, kaj tiel aperis la markoj “Movado”, “Universo”, “Eterna” kaj “Rado”.

Nuntempe en Bruselo kaj Strasburgo la kostoj de samtempa interpretado estas astronomiaj, ĉar Eŭ-

ropa Unio funkcias kun 23 lingvoj. Oni tradukas el ĉiu lingvo al la 22 aliaj, kio signifas precize 506 tradukdirektojn. Se oni metus en la mezon Esperanton kiel pontolingvon, necesus nur 46 tradukoj. La esperantistoj batalas por ke tiu utopio realiĝu.

Aliaj parolantoj povos memorigi ĉion, kion faris Claude Gacond por Esperanto. Kiel reprezentanto de la urbaj instancoj, mi ŝatus substreki alian aspekton de lia vivo, lian engaĝiĝon politikan.

Claude Gacond oficis komence en la Ĝenerala Konsilio de La Sagne, poste en la estraro de ĉi-tiu municipo. Li aktivis ankaŭ dum pluraj jaroj en la Granda Konsilio de la kantono Neuchâtel, vikle defendante la aferojn kiuj estis al li karaj sed respektante siajn kontraŭulojn. Estis sendube plezuro por li ekscii, ke la 18an de februaro 2009 liaj posteuloj en la kantona leĝdona organo alprenis per 60 voĉoj kontraŭ 41 mocion kun titolo “Favori Esperanton”.

Ni vivas en mondo de malfermiĝantaj landlimoj, de libera cirkulado de personoj kaj de kapturita evoluiĝado de la teknikaj rimedoj por komunikado. Estas do grave, ke la loĝantoj de la diversaj landoj praktiku, aldone al sia denaska lingvo, iun vehiklan lingvon. Hodiaŭ temas pri la angla, kun ties multaj esprimoj kiuj malriĉigas la francan lingvon. Morgaŭ tio povus esti Esperanto, kiu respektas ĉies kulturajn diversecojn kaj kiu, aldone, estas tre facile lernebla.

Kun Louis Chevrolet, Blaise Cendrars kaj Le Corbusier, La Chaux-de-Fonds estis la patrujo de pluraj utopiistoj. Claude Gacond vic-

iĝas en tiu tradicio, kaj estas certe, ke lia persistemo estos fruktodona kaj kontribuos al la konstruado de pli bona mondo.

Mi deziras al vi agrablan finon de via restado en La Chaux-de-Fonds

kaj esperas, ke vi malkovros ĉe nian gastamon.

*Pierre-André Monnard*

Prezidanto de la Urba Plenuma Konsilio.

*(Elfrancigis Brian Moon)*

## UEA salutas Claude Gacond

Estimataj Claude kaj Andrée,  
estimataj eminentuloj de la lokaj kaj regionaj instancoj,  
kaj karaj geamikoj,

Mi reprezentas ĉi tie ne nur Universalan Esperanto-Asocion, kies honora membro Claude Gacond estas, sed ankaŭ mian landon, Baraton, kun kiu Svislando havas longan rilaton de amikeco. Pli konkrete enkorpiĝis tiun rilaton la sviso Edmond Privat, kiu estis persona amiko de Mahatma Gandhi. Necesas aparte memori, ke Privat rolis en la Ligo de Nacioj, kiam Barato, kiel plenrajta membro de la Ligo, malgraŭ sia kolonia statuso, sponsoris en 1921 kaj 1922 rezoluciojn favore al la adopto de Esperanto. Mi volus substreki la fakton, ke Svislando kaj Barato prezentas du malsamajn modelojn de la universaleco. En Svislando temas pri modelo horloĝe preciza, konforma al la striktecoj bezonataj pro la klimato, dum en Barato, kiel vi vidas de la komfortaj manikoj de mia ĉemizo, temas pri modelo treege allasema, kiu tamen funkcias. La dialogo inter tiuj du modeloj atentinde kaj tre home rolis en la

amikecoj inter individuaj svisoj kaj baratanoj ankaŭ en Esperantujo.

Unu baratano, kies rilaton kun Svislando mi volas aparte mencii, estis mia mentoro Lakshmiwar Sinha. Lin Rabindranath Tagore sendis al Svedujo por studi slojdon en 1928, kaj tie Sinha lernis ankaŭ Esperanton; li fariĝis la absolute ikona ambasadoro de Barato en la tuta Esperantujo. Bedaŭrinde la preskaŭ civilmilitaj kondiĉoj post la disdubiĝo de la lando en 1947 bruldetruis lian kolekton de 3000 Esperantaj kaj 7000 alilingvaj libroj, kaj li devis fuĝi de Orienta Pakistano al Barato sukcesinte konservi nur kvindek el tiuj libroj; lia Esperanta laboro devis longe paŭzi. Post la dua mondmilito li reaperas sur la Esperanta ekrano ĝuste kiam li paŝas en la oficejon de Claude Piron en Ĝenevo, kaj diras, en malrapida sed senerara Esperanto: “Mi jam de dek sep jaroj ne plu havas la okazon uzi Esperanton, sed volus denove esti en kontakto kun la geamikoj. Ĉu vi povus helpi min refari la kontaktojn?” Tiuj refaritaj kontaktoj ebligis, ke li modeste rekonstruu ian Esperanto-bibliotekon; ĉi-foje temis pri kolekto nur de 500 volumoj, sed

en nia lando 500 ne estas malgranda cifero.

Post mia esperantistiĝo en 1967 en Kolkato, mi aŭdis pri s-ro Sinha en 1968 kaj tuj kontaktis lin en Santiniketan, centon da kilometroj norde de Kolkato. Mi komencis viziti lin, kaj li notis, ke mi atentis iom malpli lin ol lian kolekton de libroj kaj revuoj. Li diris: “Vi ofte vizitas Santiniketan; mi volas, ke vi vizitu min kaj ne nur mian kolekton! Mi nun donacos mian kolekton al la Nacia Biblioteko de Barato en via urbo, Kolkato, por ke vi povu tie legi.” La biblioteko petis min katalogi la librojn; dum la sesmonata breĉo inter mia abiturientiĝo fine de 1969 kaj mia ekstudentiĝo en 1970 mi ĉiutage iris al la biblioteko kaj simple voris tiujn 500 librojn.

Se niaj institucioj ne estus tropike malstriktaĵ, la Nacia Biblioteko certe sendus sian omaĝon al Claude Gacond. Bonvolu simple supozi, ke ĝi rajtigis min tion fari en ĝia nomo. Supozu ankaŭ, ke la spirito de s-ro Sinha, kiu forpasis en 1977, benas nian feston.

Verdire, Esperanto ja restus hobia, sed ne povus persisti kiel vere nobla hobia, se ne dediĉus sian vivon al ĝi centoj da vere seriozaj laborantoj. Inter ili unu el la plej persistaj, plej sindediĉaj kaj plej fruktaj estas Claude Gacond. Universala Esperanto-Asocio fieras havi lin inter siaj honoraj membroj, kaj nun ĝojas havi la okazon por saluti lin okaze de lia okdekjara jubileo.

Okaze de tia ĉi festo, oni atendas de parolantoj, ke ili rakontu surbaze de la propraj spertoj. Mi mem iam enŝoviĝis en gramatikan debaton

inter Claude Gacond kaj la karmemora Georges Lagrange en Literatura Foiro. Krom tio, bedaŭrinde, mi havas nenion por elkorbigi; miaj bibliotekaj konatiĝoj kun Esperanto kaj esperantologio okazis en Kolkato kaj Roterdamo, ne en Svislando. Mi unuafoje manpremis kun Claude Gacond en Ĝenevo en 2008 dum simpozio en Unuiĝintaj Nacioj, kaj tiu renkontiĝo estis ege mallonga. Tial mi tuj transiras al la spertoj de aliaj.



*Probal Dasgupta*

Mi aŭdis pri la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia ĉefe de nesvisoj, kiuj profitis de tiu unika biblioteko kaj pliprofundiĝejo, kaj kiuj senescepte rakontis pri la inspira kaj energia personeco de Claude Gacond. Kiel eksterulo mi havas la netan impreson, ke interalie la klasika epoko de serioziĝo de la budapeŝta skolo de la interlingvistiko ŝuldas grandan par-

ton de sia energio ĝuste al la inspiro de Claude Gacond. De tiu kaj similaj faktoj mi deduktas, ke pensi pri rekreo de esperantologia studkerno en iu urbo surbaze de tiulokaj talentoj maltrafas la veran trafikon de la ideoj. Ĝuste tiaj sindediĉaj speciflokaj fortuloj kiel Claude Gacond ebligas, ke entreprenoj interlingvistikaj en Hungarujo aŭ Pollando havu seriozan disponaĵaron kaj tial science fundamentitan bazon por siaj esploroj.

Mi aparte ĝojas, ke la biblioteka kaj esplora entrepreno de Claude Gacond estas frape inkluzivema kaj komprenas sub la ideo de 'Lingvo Internacia' ankaŭ aliajn planlingvojn kaj tiuterenajn projektojn. Ekzistas cirkonstancoj, sub kiuj la homoj volas sondi aliajn eblojn. La poeto Jiří Karen rakontis al mi, ke al li Esperanto aspektis tro ligita al la komunisma reĝimo en Ĉeĥoslovakujo, kaj ke pro tio li prove uzis diversajn aliajn planlingvojn. Li frustrigis pri tiuj, kaj trovis sin devanta reveni al Esperanto ĉirkaŭ la momento, kiam lia lando sukcesis liberiĝi el sub la diktaturo. Ankaŭ post tiu revarbiĝo en Esperanton, restis ĉe Karen la firma kompreno, ke la aliaj projektoj estas finfine dialektoj de la Esperanta strebado, kaj ke ni esperantistoj devas fariĝi multe pli kleraj kaj komprenemaj al tiuj supozataj rivaloj, se ni volas serioze funkciigi entreprenon de tutmonda interkompreniĝo. Ene de Esperanto mem, la dekkvina regulo

reprezentas la naturalismon kaj la afiksa sistemo enkorpiĝas la skemismon: de aliaj planlingvoj, kiuj donis al tiuj principoj pli drastan potencon, ni devas lerni la plenan signifon de tiuj tendencoj en nia propra lingvo. Ni estu dankaj al Gacond, ke li tiel frue rimarkis la gravecon de la ekumena inkluzivemo sur tereno, kie tiu sento ofte mankas.

Eble mi konfesu, ke al tiu tereno ligiĝas unu el miaj personaj sopiroj. Mi lastatempe elŝutis po unu gramatikon de Ido, de Interlingua kaj de Volapük, kun la espero iam lerni almenaŭ unu el tiuj rivalaj lingvoj. Vi certe scias, ke al la listo de la konataj pekoj krokodili, aligatoroj kaj gaviali lastatempe aldoniĝis la nova peko lacerti – paroli en la malĝusta planlingvo. Mi delonge sopiras povi lacerti, sed bedaŭrinde ankoraŭ ne kapablas. Vi estas simpatia publiko; bonvolu ja deziri al mi, ke mi baldaŭ trafu lerni unu el la rivalaj lingvoj kaj finfine kapablu lacerti !

Per tiuj vortoj – malpezaj sed indikantaj mian aliĝon al lia stilo de seriozeco – mi aldonas al la asocia gratulo mian propran omaĝon al la unika personeco Claude Gacond okaze de lia jubileo. Ĉion bonan al li kaj al la institucio, kiun li fondis !

*Probal Dasgupta*

Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio.

*La fotoj sen indikoj en ĉi tiuj Kulturaj paĝoj estas de Stefano Keller*



# Alparolo de Ilona Koutny

## Vivo dediĉita al Esperanto

Ĉu esperantisto povas esti profesio? Kion signifas profesia esperantisto? Se tiuj demandoj leviĝas, ni kutime pensas pri tiuj malmultaj homoj, kiuj – profesie instruas esperanton en lernejo, kvankam kutime temas pri aldona okupo post la instruado de la ĉefa fako; – redaktas kaj eldonas esperantajn librojn, gazetojn, novaĵbultenojn aŭ verkas artikolojn por ili, inkludante ankaŭ radiajn kaj retajn ĵurnalistojn; – administras kaj organizas la movadan vivon, informas la eksteran mondon en oficejo kiel la Centra Oficejo de UEA; – estas bibliotekistoj. Eblus ankoraŭ daŭrigi la vicon per turismaj gvidantoj, verkistoj kaj lingvistoj... Multon ni povas trovi en la vasta agado de Claude Gacond dum lia longa vivoverko.

## Intruisto

Li – instruisto de elementa lernejo – evidente instruis ankaŭ esperanton al siaj gelernantoj, sed ne haltis ĉe la elementa nivelo, kreis korespondan kurson por plenkreskuloj kaj fondis la Ferian Altlernejon en la Kultura Centro Esperantista (KCE). Tio estis bazo por kunlabori kun prof. István Szerdahelyi, gvidanto de la Esperanto-fako de la budapeŝta Eötvös-Universitato (ELTE). Li plurfoje gastis en KCE kaj gvidis kursojn, esploris en CDELI. Li provis sendi siajn gestudentojn por staĝi en KCE – tiel mi venis al La Chaux-de-Fonds: staĝi kiel studentino, poste kiel

kursgvidanto. Laborante en ELTE ankaŭ mi sendis miajn studentojn staĝi al KCE kaj CDELI.

Claude ellaboris propran metodon por kiel eble nature lernigi la lingvon. Li montris, ke esperanto povas helpi eĉ en la instruado de la franca uzante la klaran gramatikan sistemon de esperanto.

## Redaktoro

Por informi pri la agado en KCE kaj CDELI li redaktis la Monatan Cirkuleron ekde la 70aj jaroj, por fakaj temoj servis la KCE-kajeroj. Tie aperis i. a. la diskutoveka studo de István Szerdahelyi pri Vorto kaj vortelemento. Nun Claude redaktas la SES Bultenon.

Kiel radia parolisto kune kun la edzino Andrée, li pretigis kaj prezentis regulan programon de la Svisa Radio Internacia dum longaj jaroj: proprajn programojn kaj intervjuojn kun famuloj. Ankaŭ kun Szerdahelyi registriĝis intervjuo. Nun li prilaboras ilin kaj metas en la reton por ke ili estu alireblaj.

## Oficisto de KCE kaj GEP

Claude kreis insulon de Esperantio en La Chaux-de-Fonds kun la ofte funkcia kursejo, tranoktejo, manĝejo – mi spertis ĝin dum mia unua restado en 1975 kaj ekŝatis tiun etoson.

Claude trovis la manieron kunlabori ankaŭ kun la ekstera mondo, kun la urbaj instancoj. Evoluigis

KCE per pluraj domoj el la kredito de esperantistoj.

### **Bibliotekisto, arkivisto de CDELI**

Malmultas en la mondo grandaj kolektaĵoj de planlingvoj kaj de esperanto. CDELI – parto de la urba biblioteko – estas la plej grava kolekto de planlingvaj kaj priplanlingvaj materialoj. Claude laboris kaj laboras senpage por tiu nobla celo. Ne nur atendis librojn, sed li serĉis ilin, transprenis heredaĵojn, interŝanĝis kun aliaj kolektaĵoj.



*Ilona Koutny*

Li kreis trezorejon por interlingvistoj, daŭre helpas per tio la sciancan laboron pri interligvistiko. Ni ricevis librojn de li, kiam mi ankoraŭ laboris en la E-fako de ELTE kaj ankaŭ nun por la Interlingvistikaj Studoj de

UAM. En 1975 mi pasigis kelkajn monatojn laborante en la biblioteko, katalogante la librojn mi spertis la lundajn kunvenojn, kiuj arigis plurajn volontulajn esperantistojn kaj daŭras ankaŭ nun.

### **Persone**

Kun bona humoro li alfrontas la problemojn de la vivo. Claude ŝatas la montojn, la migrado apartenas al lia komuna vivo kun la edzino. En Svislando mi ekŝatis la montojn : la milde ondumantan Ĵurason dum semajnfinoj kaj la majestajn Alpojn dum la somera migrado kun esperantistoj (1975). La komuna migrado post 33 jaroj revokis miajn rememorojn.

Claude Gacond estis kaj estas la motoro de la poresperanta agado en La Chaux-de-Fonds, sed ofte modeste li restas en la fono kaj transdonis la gvidan taskon al aliaj. Per KCE kaj CDELI li kontribuis al la historio de Esperantio, kaj faris el La Chaux-de-Fonds unu el ĝiaj gravaj urboj, konata en la tuta mondo inter interlingvistoj.

Kara Claude, ni deziras al vi multe da energio por daŭrigi la ordigon de via vivoverko, enretigi viajn materialojn, diponigi viajn spertojn kaj memorojn por pli granda publiko, kaj multe da ĝojplenaj momentoj kun Andrée !

*Ilona Koutny*

Iama dankema studentino el Hungario (nun profesorino ĉe UAM en Pollando, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj).

## Festparolado de Katalin Kováts

Estimataj ĉeestantoj, kara Claude,

Mi sincere dankas vin, ke vi fariĝis 80-jara. Tio donas al ni ĉiuj perspektivojn, al mi mem eblon rememori la pasintan tempon kaj stari antaŭ vi en la nomo de multaj pedagogoj, iamaj studentoj de la hungara universitato Eötvös Loránd kaj ankoraŭ multaj aliaj, kiuj venis al KCE kaj provis lertiĝi kaj spertiĝi sub viaj manoj.



*Katalin Kováts*

Mi estas unu el tiuj, kiuj ĉi tie komencis sian esperantistan instruistan karieron. Mi estis jam pedagogo, kiam en 1989, kiel studento el Budapeŝto, mi havis la okazon veni por trimonata staĝo al KCE.

En tiu tempo estis mirinda eblo por hungarino veni al Svislando,

entute vojaĝi eksterlanden. Se vi konas iom la historion kaj la politikan vivon, 1989 estis perturba jaro kaj en Hungario kaj en tuta Eŭropo. En junio, kiam mi iris ricevi mian vizon, ĝuste en tiu tago estis granda manifestacio en Budapeŝto kaj la reentombigo de Imre Nagy.

For de la hejmo, ĉi tie dum unu el la „te-paŭzaj universitatoj“, kiel Tomasz Chmielik nomis niajn dum-paŭzajn diskutojn, vi ĉiuj (Tomasz, Tazio Carlevaro kaj vi mem) provis konvinki min, ke la socialismo disfalos en Hungario. „Oni pravis hejme, dirante, ke estas multaj malamikoj de la socialismo ekster la bloko“, pensis mi dum viaj argumentadoj. La sekvan tagon János Kádár mortis. La Historion, evidente, samkiel ankaŭ travivi, eblis vidi kaj legi plurmaniere.

Mi estis tute nenion scianta pri la mondo kaj anstataŭ veni studi Esperanton kaj pedagogion, mi fakte lernis multe pli : renkontis homojn, spertis interkulturajn ŝokojn kaj proprahaŭte sentis la diferencojn inter la socialisma lando kaj la riĉa Svislando. Ili estis enormaj.

Ĉiumatene mi iris frue matenmanĝi por ke mi certe povu preni bananon, kiun mi tiom ŝatis. Kia riĉeco, kia feliĉo ! Ĝi daŭris ĝis la tago kiam iu moke demandis al mi : „Ĉu vi estas simio ?“ Humiligite mi rezignis je la frukto, kiun mi povis manĝi en mia lando nur kristnaske.

Mi eĉ hodiaŭ memoras la promenadojn tra la montoj, kampoj kaj

bienoj, gvidatajn de vi, Claude, kun spritaj kaj instruaj rakontoj, anekdotoj kaj ŝercoj.

Mia staĝo konsistis ne nur el lingvaj kaj metodikaj spertiĝoj. Mi ankaŭ ĝardenumis, plantis la rozojn antaŭ la nuna lernejo *Granda Ursino*. Mi platigis la grundon apud la manĝejo, kuiris, se tio estis bezonata kaj dum mi tion faris vi etendis la freŝe lavitajn litaĵojn.

Ni venis por lerni metodologiajn artifikojn de vi, sed vi montris ankaŭ tion, ke bona instruisto ne nur predikas, ne nur lecionojn donas, sed florojn plantas, zorgas pri ĉio esenca, kio rilatas al kurso kaj ties sukcesa okazigo. Jes, vi ankaŭ mastrumis KCE-n, kelkfoje malfacile, kun malplena kaso. En 1989 – ĉu vi memoras? – la kaso ofte estis malplena. Tamen estis neforgeseblaj monatoj.

Por mi speciale gravis la seminario de Irena Szanser, kiun partoprenis pluraj nun ĉeestantoj, kiel Nicole Margot, Alain Favre kaj Mireille Grosjean. Mi mem ne povis esti kursano pro manko de financoj, sed mi fariĝis asistanto. La lernantoj de mia paralela kurso fariĝis kobajoj de la seminarioj. Postlecione mi provis helpi al ili ankaŭ en la teoriaj studoj kun la bedaŭro, ke mi ne povas esti oficiala seminariano.

Fine okazis mirakloj. Dankon al Mireille Grosjean, kiu aĉetis por mi la kurslibron, dankon al Els Kervers, kiu pagis mian ekzamenkotizon kaj lastminute ebligis al mi ekzameniĝi kun la grupo.

Tiel fariĝis la kurso de Irena Szanser por mi multe pli grava ol simpla metodika trejnadado.

Ĝi estis kurso pri la vivo, pri humanismo, pri kiuj la diplomo estas ne nur la blua papero, sed la memoraĵoj, kiuj ebligas al mi nuntempe, kiam mi staras je la alia flanko de la mondo, rimarki la bezonojn kaj helpi en neceso. Ĝuste en nia diaspora kaj tiom malegala Esperantujo utilas nun tiuj iamaj KCE-spertoj.

La staĝo ĉe vi estis ankaŭ lingva sperto: novaj akĉentoj, nova lingvoza kutimo. Sufiĉas pensi nur pri la unua kursotago, kiam vi, Claude, la unuan fojon venis en la klasĉambron kaj vigle demandis al ni: „Ĉu vi ĉiuĵas?“ Mi bezonis longajn sekundojn por deĉifri la nekonatan vortkreaĵon.

Neforgesendas ankaŭ via originala ideo pri la evito de gramatikaj terminoj kaj uzo de artifika sistemo de piloto kaj ne-piloto.

La volontulaj laboroj en CDELI malkovrigis al mi la riĉan literaturon de Esperanto, la sennombrajn gazetojn kaj eldonaĵojn (ordigendajn en la subtegmentejo) kaj malfermis al mi studojn pri interlingvistiko kaj aliaj planlingvoj, kio poste gvidis min al instruado de tiu objekto en universitato.

Dum la staĝo estis eblo renkonti homojn el diversaj landoj, eĉ kontinentoj. Multajn el ili mi re-kaj revidas en la movado kaj kelkaj el ili ludis gravan rolon en mia posta vivo.

Tazio Carlevaro, kiu per donacita komputilo jam en 1990 malfermis antaŭ mi la retan mondon. Walter Klag, kiu invitis min al Vieno, kie

mi dum jardeko gvidis programojn, kursojn, la lecionojn de muzeaj noktoj. Pri tio eksciis Mila van der Horst-Kolinska kaj farigis el mi Cseh-instruiston kaj trejniston. Pere de ŝi malkovris min Cathy Schulz el Usono kaj invitis min plurfoje instrui al San-Francisko, kio kontaktigis min kun ESF, sen kiu nun ni ne havus edukado.net kaj multajn aliajn atingaĵojn.

De unu staĝo ĉe vi, Claude, en KCE, startis mia tuta kariero. Tre verŝajnas ke sen tiu eblo elpaŝi al la mondo post la universitataj studoj en ELTE mi ne restintus tiom ligita al la movado, kiu fakte fariĝis mia vivo. Koran dankon al vi, Claude, pro tio.

Por festi vin mi ne venis kun malplenaj manoj. Mi portis al vi ion. Ne nur la vortojn kaj la memoraĵojn, sed du diversajn donacojn :

Unu estas – kiel sinjoro Haupenthal jam menciis – mia libro *Stel-semantoj en la ora nordo*, naskiĝinta el la artikolo, verkita por via memorlibro. Okaze de via 80a naskiĝdatreveno ni tiel povis festi la 110-jaran datrevenon ankaŭ de alia eminenta pedagogo, Tiberio Morariu, Cseh-instruisto, kiu siatempe al pli ol dek mil personojn instruis Esperanton. Sen la motivo esplori pri li, por vin omaĝi, neniam ekestintus tiu ĉi libro. Ne ĝojus la tuta familio de Morariu, kies membroj nur nun ekkonis, kion faris la patro kaj avo, iom mistaksata de ili dum jardekoj.

Ni pedagogoj, ĉiuj estas semantoj, fruktoj de kies laboro venas nur post jaroj, kvin jaroj, dek jaroj, dudek jaroj, fakte sen memoro pri la

vivdoninto kaj ofte sen la eblo ĝui la rikolton. Mia dua donaco rilatas al Edmond Privat, pri kies vivo kaj agado mi lernis de vi, ĝuste en tiu ĉi konstruaĵo. Mi jam de pli ol jardeko havas donacon al vi, mi simple atendis ke vi fariĝu 80-jara. Nun mi kunportis por vi la dokumentojn, kiujn mi trovis en la kofro de Andreo Cseh, forĵetita surstraten antaŭ dek sep jaroj, kiam mi volontulis ĉe la Internacia Esperanto-Instituto en Hago. Mi longe opiniis, ke la enhavo de la kofro devus reiri al IEI, sed oni tie ne kreas indan lokon, ekzemple muzeon aŭ alireblan arkivon por la Cseh-materialoj, do tial nun mi decidis, ke almenaŭ la komunaj dokumentoj de Cseh kaj Privat devus esti en CDELI, ĉe vi. Temas pri la unuaj dek kvin paĝoj de verko *Vivo de Gandhi*, kiujn Edmond Privat tajpis, sendis al Andreo Cseh por korektado kaj por la unua aperigo en *La Praktiko*. Plie temas pri plimalpli dudeko da originalaj leteroj, korespondado inter Edmond Privat, Andreo Cseh kaj Julia Isbrücker, kiuj kuŝis ĉe mi dek sep jarojn, kaj mi nun transdonas al vi tiun materialon, indan je prilaborado. Kun tiuj ĉi donacoj mi venis kaj lasas ilin ĉe vi, en bonaj manoj.

Mi deziras al vi bonan sanon, energion kaj multajn helpantojn por ke vi sukcesu realigi viajn projektojn, el kiuj min precipe interesas via metodika paĝaro kaj alŝuto kaj komentado de la tieaj trezoroj.

Claude, vivu longe inter ni.

*Katalin Kováts*

## Memoraĵoj de kunlaboro – Meritoj de Claude

Kara Claude, karaj ĉeestantoj,

Svisa Radio Internacia dum 30 jaroj,  
inter 1962 kaj 1992.

Mi konatiĝis kun Claude Gacond en 1980, kiam post mia instaligo en Svislando, deziranta daŭrigi mian agadon poresperantan, mi tuj kontaktis lin, la tiaman ĉefan lokan aktivulon. Baldaŭ ni iĝis kunlaborantoj en Kultura Centro Esperantista, centro de li kreita, kie mi ekokupiĝis pri esperanto-instruado kaj metodologio. Dum nia plurjara kunlaborado, kunagado, ĉu en la instruado aŭ en metodologia pretigado, ĉu laborante pri arkivaĵoj aŭ pri la retejo de CDELI, ne nur en momentoj de te-paŭza babilado, sed ankaŭ laborante pri malkonstruo de kelo kion ni transformis al instruejo, mi multon eksciis pri lia vivo, celoj, agadoj.

Jam 21-jara li eklernis esperanton kun Andrée, lia kunstudantino pri pedagogio, kiu poste fariĝis ne nur lia edzino, sed ankaŭ lia fidela kaj nelacigebla akompananto dum lia agado poresperanta. Claude estis porpaca aktivulo, militrifuzanto, malobeanto de oficiraj ordonoj, kiu tiel devis eniri la malliberejon de la armeo. Tio, anstataŭ esti punejo, servis al li kiel studejo improvizita por lia perfektigo kaj kleriĝo en Esperanto.

Kiel instruisto, pedagogo, Claude faris grandan kontribuon al la esperanta movado realigante okfoje eksperimentan instruadon de Esperanto en la publika lernejo, kie li instruitis tiutempe. La spertojn de tiuj eksperimentoj li publikigis en sia diplomlaboraĵo.

Claude estis posteulo de Edmond Privat, kiel esperanta prelegisto ĉe



*Stefano Keller  
fotita de François Gacond*

Jam kiel junulo li ekinteresiĝis pri libroj, literaturo. Kiam li vizitadis la lokan esperanto-grupon, li konstatis ke neniu okupiĝas pri la libroj de la grupo. Pro tio li komencis prizorgi tion ekkolektante librojn, konsistigante arkivojn. Tiel kreiĝis baza kolektaĵo de libroj kaj dokumentoj (ne nur esperantaj, sed skribitaj ankaŭ en kaj pri diversaj aliaj planlingvoj) kio poste iĝis la komenca havaĵo de CDELI, kion li fondis en 1961. En 1967 Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) iĝis statute oficiala planlingva fako de la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds. Dank' al la sin-

dediĉo de Claude, ekde tiam nia movado, esploristoj, lingvistoj povas disponi pri tiu arkivejo kaj studcentro unika. Li multe helpis al esperanto-instruistoj kaj al institucioj, edukantoj de esperanto-instruistoj, kiel ILEI.

Nu, hodiaŭ ni festas ne nur la 80-jariĝon de Claude Gacond, sed ankaŭ la kvindekjariĝon de CDELI ([www.cdeli.org](http://www.cdeli.org)).

En la jaroj sesdekaj, sepdekaj ne ekzistis multaj studcentroj de Esperanto en la mondo. Tiam Claude ekplanis la kreon de internacia studcentro, altlernejo kun la ĉefa studobjekto « Interpopola konduto », kio ebligus al siaj vizitantoj, staĝantoj kleriĝi, restadi laŭ la devizo « studi feriante ». Tiu centro celis disponigi al siaj utiligantoj lokon kie eblis kunligi ripozon en naturo kun lernado de Esperanto, aŭ de iu alia studobjekto pere de Esperanto. En 1968 Claude estis kunfondinto de Kultura Centro Esperantista (KCE), kion en 1974 li instalas en La Chaux-de-Fonds. Naskiĝis tiel esperanta kvartalo de la urbo, kie troviĝis la sep domoj de KCE, al kiuj la urbaj aŭtoritatoj devis instalati stratajn indikilojn por aŭtomobilistoj kaj vizitantoj pro la ofta alveno, informpeto de uzantoj de la centro pri la vojo al ĝi.

En KCE troviĝis Internacia FERIA Altlernejo (IFA), kaj mi havis la honoron kaj ĝojon kunlabori kun Claude en tiu institucio. Ni anoncis kursojn de Esperanto por ĉiu semajno de la monatoj dum la tuta jaro. La lasta semajnfino de la monatoj estis rezervita por studa semajnfino. Kiam ne estis aliĝintoj, tiam ni laboris pri la metodiko de la instruado. Tiel naskiĝis la Gaconda metodo, kio estas modernigita versio de la Cseh-metoda

instruado de Esperanto. Tiu kontribuo de Claude al la metodiko de Esperanto-instruado estas unu el liaj signifaj meritoj. Hodiaŭ pluraj personoj uzas lian materialon, kiu estas elŝutebla el lia retejo : [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch).

Verŝajne multaj el vi scias, ke ankaŭ en Svisa Esperanto-Societo (SES) Claude havis signifan rolon. Baldaŭ post sia esperantistiĝo li iĝis prezidanto de Svisa Esperanto-Junularo kaj poste li estis dum jaroj prezidanto de SES. Laŭ liaj iniciatoj, agemo kaj organizado okazis multaj signifaj esperantaj eventoj en Svislando. Interalie la festado de la centjariĝo de SES kaj multaj aliaj lokaj, regionaj aŭ tutsvisaj eventoj.

Ekde 1997 Claude estas la ĉefredaktanto de *Svisa Esperanto-Societo informas* (SESi), la bulteno de nia landa asocio svisa.

Mi volas aparte emfazi mian aprezon pri la maniero de Claude alfronti la laboron, la kunlaboron kun kolegoj, bonvoluloj, helpantoj. Li pripenseme zorgas pri la kontinueco de lia agado, pri la daŭrigo de la laboro de li komencita. Li pretigas la futuron certigante ke novaj homfortoj kompetentaj povu iom post iom transpreni la taskojn, plenumi, gvidi la laboron de la projektoj kiujn li kreis. Tiel, enkondukante novajn personojn en la sekretojn de la farenadoj, li povas kun trankvilo iom post iom retiriĝi, iri pli ofte al la ŝatataj promenadoj en la naturo.

Hodiaŭ sen lia interveno disvolviĝas jam la studsabatoj en CDELI, ofte li tamen volonte ĉeestas por helpi al la daŭrigantoj de lia iniciato.

Prizorgata de volontulaj kunlaborantoj, plue bone funkcias la Perkoresponda Kurso de Esperanto, kreita de

Claude Gacond por franclingvanoj.  
Tiu kurso estis ankaŭ germanigita.

Jen, nur kelkaj memoraĵoj miaj el  
nia longdaŭra kunlaborado. Vi certe  
ekscios ankaŭ multon pri Claude  
hodiaŭ.

Feliĉan, ĝojan naskiĝtagon, Claude,  
kaj ankoraŭ multajn kunlaboreblojn  
kun vi !

*Stefano Keller*

UEA-komitatano, sekretario de  
Svisa Esperanto-Societo.

## Alparolo de Marie-Louise Münger

Kara Claude,

Se vi plenumas ĉijare vian 80an  
jaron, tio signifas, ke mi ankaŭ multe  
maljuniĝis ! Mi do devas retroiri foren  
en la tempo. Kiel fieraj ni estis, in-  
fanoj de nia vilaĝeto, kiam vi pro-  
menis kun viaj gepatroj kaj Dag – ilia  
hundo – laŭlonge de la strato en La  
Sagne.

Nia nova juna instruisto estis sur-  
prizplena por la enloĝantaro. Dank' al  
li ni vidis nian unuan japaninon en la  
valo, Yoshiko Kaĵino, kaj poste ni  
konatiĝis kun Umeda kaj Eizo Itoo.  
En 1958 vi venigis pli ol 200 esperant-  
istojn kaj loĝigis ilin ĉe la vilaĝanoj.  
Malfeliĉe la dimanĉon matene la  
elektro-sistemo paneis ĵus antaŭ la  
kuirado de la supo. La kamparaninoj  
tuj alvenis kaj forprenis ĝin en siajn  
hejmojn kaj pretigis la tagmanĝon per  
ligna fajro. Samtempe la viroj ludis  
muzik-koncerton por anstataŭi la  
anoncitan filmon. Je tiu okazo,  
Claude, vi permesis al niaj Sagne-anoj  
travivi solidarecon kun nekonatoj.  
Nova spirito fluis tra la vilaĝo.

Se mi rakontas tiun eventon, tio  
estas por substreki, ke via laboro por  
kaj per esperanto estis ne nur por la  
lingvo mem, sed ke vi uzis ĝin por pli  
vasta laboro je socia kaj politika

niveletoj. Vi estis deputito ĉe la komun-  
uma Ĝenerala Konsilantaro dum  
16 jaroj kaj dum 4 jaroj ĉe la kantona  
Granda Konsilantaro. En la lernejo vi  
estis bonega pedagogo. Vi neniam  
faris diferencon inter la infanoj de  
riĉaj familioj kaj de infanoj izolitaj,  
malriĉaj aŭ vivantaj en socie malfortaj  
medioj.

En tiu mallonga interveno mi volus  
substreki tri trajtojn de via personeco :  
La unua estas via kapablo malkovri la  
talentojn. Ke via kunlaboranto estas  
universitatano aŭ simpla manlaboristo,  
vi ĉiam trovis la taŭgan laboron, por  
ke ŝi aŭ li povu doni la plej bonon de  
si mem kaj plenumi sian taskon kun  
ĝojo. Same, kiam vi malkovris talent-  
ulojn, kiuj povos helpi vin en via  
laboro por KCE aŭ CDELI, vi en-  
vicigis ilin en la liston de viaj kun-  
laborantoj. Tiel ni malkovris en La  
Chaux-de-Fonds multajn vizaĝojn  
venantaj el la tuta mondo.

La dua talento, kiu mirigas min,  
estas ne perdi la fruktojn de via  
laboro. Kiam vi faris eksperimentojn  
en esperanto-medio kaj ankaŭ kun la  
infanoj eksterlande devenaj, tiam vi  
faris detalan raporton al la Instru-  
departemento tiamaniere, ke ili estu  
enkluditaj al la metodologio kaj utilaj  
al la posteuloj.





*Marie-Louise Münger*

La trian punkton, kiun mi volus substreki, ne temas pri tio, kion vi faris, sed pri kiu vi estas. La unua vorto, kiu sin trudas al mi, estas « menslarĝeco ». Kuriozeco, malfermiteco, toleremo bone priskribas vian personecon. Antaŭ nelonge vi parolis al mi pri la homaranismo. Ĉiu homo estas simpla ano de la tuta homaro.

Kiam mi diras « simpla », tio ne signifas malgranda. Ĉiu homo havas taskon, kiun li povas plenumi aŭ preterpasi, sed ĉiu, kiel grava estu lia rolo, havas saman dignecon. Vi malfermis vin al multaj filozofioj, religioj, kulturoj kaj artoj. Vi senlace provis vivi en via ĉiutaga vivo viajn personajn konvinkojn. Pro via malavareco, via kuraĝo, via amikeco, mi dankas vin. En tiu danko mi enkludas ĉion, kion ni travivis je privata nivelo.

Mi deziras al vi ankoraŭ longajn jarojn, kiujn vi povos travivi feliĉe kun via edzino. Kaj mi finos tiun mallongan intervenon kun penso de Zamenhof: *Vi ne estas devigata fini vian taskon, sed vi ne rajtas preterpasi ĝin.*

Por hodiaŭ kaj la venontaj tagoj mi deziras al vi fortojn, sanon kaj multe da ĝojo.

*Marie-Louise Münger*

Diakono en Val-de-Travers.

## **Fernand Donzé**

(16a februaro 1923 – 8a februaro 2011)

Direktoro de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds ekde 1952 ĝis 1988 kaj fondinto de CDELI en 1961

La du sekvaj omaĝoj estis dicitaj je lia entombigo la 11an de februaro 2011: la unua de s-ro Michel Schlup, eks-direktoro de la Publika kaj universitata biblioteko en Neuchâtel (BPU) kaj la alia de s-ino Loyse

Renaud Hunziker, politika amikino de Fernand Donzé.

Ambaŭ tiujn du personojn ni dankas pro ilia afabla traduk-permeso.

*(Elfrancis Martine Schneller)*

## Omaĝo al Fernand Donzé

Ni estas ĉi tie por esprimi nian lastan omaĝon al Fernand, kiu forlasis nin mardon vespere (la 8an de februaro), iom kontraŭ sia volo. Ĉar li kutime diris, ke li sentas sin ankoraŭ bone sur tiu tero, malgraŭ la malsano, kiu ronĝis lin; ĝis la lastaj tagoj, hospitaligita en Couvet, li restis ĉeestanta, ligita al la mondo, kun vigla spirito.

Daŭre avida je informoj, li ne ĉesis peti siajn tri ĉiutagajn gazetojn, kies abonanto li estis, kun krome *le Canard enchaîné* (la *Katenita Anaso*), kiu ĉiusemajne ravis lin.

Tiu ĉeesto al la mondo estas ĉefa trajto de la personeco de Fernand. Ĝi signas vivlinion multilate esceptan.


Fernand grandiĝas en La Chaux-de-Fonds, en modesta medio : li estas la pli juna de kvarinfana familio kies ekzisto estas tre frue skuita de la morto de la patro, horloĝisto. La monrimedoj ekde tiam mankas por garantii la studojn de la junulo, brila lernanto en la gimnazio de la urbo.

Sed bonŝanco feliĉe estas kun li. Auguste Lalive, direktoro de la gimnazio, havigas al li stipendion, kiu ebligas al li sekvi la kursojn de la seminario por instruistoj.

Sed instruado ne estos lia vojo. Lasante sian instru-diplomon en tirkesto, li engaĝiĝas en la Urba Biblioteko en 1943, post la militservo. Li estas helpanto de la direktoro, la poeto Jules Baillods, kiu kuraĝigas lin studi beletron en la Universitato de Neuchâtel, en la perspektivo de lia postsekvo. Li proponas al li adaptitan horaron por ebligi al li sekvi la kursojn, 60 horojn je laboro somere kaj 30 vintre.

En 1950, Fernand akceptas tiun defion dum li jam havas familion. Li edziĝis en 1947 al Suzy Droz, renkontita en la Seminario kaj kiu ĵus naskis ilian filinon Marie-Claude.

Tiuj studoj devigos lin al kvar jaroj da intensa laboro je la fino de kiuj li sukcesas en sia beletra licencio en la printempo de 1953.



*Fernand Donzé  
fotita de Claude Gacond en 1961*

Sed intertempe li iĝis direktoro de la biblioteko sekve al la subita forpaso de Jules Baillods, tre disputata posteno kiu konkurencas lin kun lia iama profesoro en la seminario Pierre Hirsch. La Chaux-de-Fonds neniam havis la okazon bedaŭri tiun elekton. En 1953, la Biblioteko estis alitempa institucio, malnova, blokita en ejoj ne

sufiĉaj, kie la libroj ne estis videblaj sed alportitaj laŭ peto en aĉa disdonloko. Malbone lumigita, la legoĉambro ne estis pli akceptema, kun neniuj libroj libere konsulteblaj.

Tuj post sia nomumo, Fernand eklaboros, kun la volo meti la libron kaj la kulturon je la dispono de ĉiuj, kaj antaŭ ĉio malfermi grande la pordojn de sia Biblioteko. Li modifos ĝin ĝisfunde, modernigante kaj refreŝigante la ejojn, malfermante libere alireblan ĉambron kun 15 000 libroj, instalante legoĉambron kun pli ol 3000 libere konsulteblaj libroj, reklasigante la fondusojn laŭ modernaj normoj, plilarĝigante la malferman horaron, enkondukante la senpagon de ĉiuj servoj.

Sed la publika legado ne estas la nura priokupo de la juna direktoro. Serĉante ekvilibron inter larĝpublika kaj scienca biblioteko, li rangaltigas sian institucion esplorcentro rilate la literaturon, la artojn kaj la historion de la regiono: iniciatante deponojn kaj arkivajn donacojn de famkonataj personoj, kiel Jules-Humbert-Droz, Edmond Privat aŭ Charles Humbert kaj akceptante ekde 1961 la Centron de dokumentado kaj esploro pri la lingvo internacia (CDELI).

Sed li devos atendi la finon de la jaroj 1970 por doni al sia institucio la ekzemplajn servojn, kiuj estas la diskoteko kaj la aŭdvida departemento. Tio dank' al la loko liberigita de la gimnazio translokiĝinte al « Bois noir ». Li zorgos pri tiuj laboroj energiplene kaj estros sian bibliotekon kun klereco, ofte direktiva pro strebo al efikeco, sed sciante ankaŭ kunigi la fortojn kiam tio estis necesa.

Se li estas aktiva en sia biblioteko, Fernand estas same aktiva en la

profesiaj organizaĵoj kaj ĉefe en la sino de la Asocio de la svisaj bibliotekistoj. En 1966 li partoprenas en la romanda grupo de la publikaj bibliotekoj kaj kreas romandan formadon por la bibliotekistaj staĝantoj. Formado, en kiu li profunde aktivos: instruante la historion de la bibliotekoj, direktante studlaborojn kaj kondukante generaciojn da studentoj al la diplomo. Li dum dekdu jaroj ankaŭ estos membro de la Komisiono de la Nacia Svisa Biblioteko.

En la asembleoj kaj kongresoj de bibliotekistoj, Fernand Donzé ne ludis ŝajnan rolon, li regule aŭdigis sian voĉon, voĉo daŭre fidele ligita al la demokratigo de la libro kaj de la legado. Liaj sindonemaj intervenoj ĉiam havis sencon, pro kio li estis aŭskultata kaj respektata.

La politika engaĝiĝo de Fernand estos poste prezentita al vi de s-ino Loyse Renaud. Sed mi ne povas tute ĝin ignori ĉi tie ĉar unu el la pli belaj sukcesoj de la bibliotekisto ĝuste estas intime ligita al tiu engaĝiĝo. Temas pri la neŭŝatela bibliobuso, kies misio estas alporti la legadon en la malgrandaj komunumoj de la kantono, kaj kies unua rondo okazis en 1974. Oni ŝuldas tiun belan entreprenon al Fernand, kiu sukcesis akceptigi tiun projekton de la Kantona Parlamento en kiun li eniris en 1961.

Emerito en 1988, Fernand Donzé fine havos tempon vivi por sia familio kies kuneston li aprezas; la ĉeesto de Marie-Claude, de Luc, lia bofilo, de Floriane kaj Bastian, liaj genepoj ĉiam estas festo. Li ankaŭ kultivas intense amikecojn, antaŭ ĉio tiujn, kiuj ebligas al li elvoki la pasintecon, lian pasint-

econ kiun li rakontos en foliaro destinita al siaj proksimuloj.

La morto de lia edzino en 2005 instigas lin forlasi Les Brenets por pliproksimiĝi de siaj familianoj en Neuchâtel.

En siaj lastaj jaroj, li nutras sin per legaĵoj kaj muziko, ŝatante partigi siajn malkovrojn, siajn emociojn sed ankaŭ siajn indignojn, kiujn inspiras al li la drivoj de la hodiaŭa socio.

Sed la tristaj notoj ne sukcesis perturbi tiun spiriton tiel pozitivan kaj entuziasman. Lia emo al la aliaj, al la

intersanĝoj faris el ĉiu renkonto belan momenton de amikeco kaj de gajeco. Antaŭ nelonge, li ankoraŭ revis pri lasta granda vojaĝo perŝipa por malkovri la Magelanan Markolon. Projekto je la mezuro de la grandega scivolemo, kiu animis lin dum lia tuta vivo, vivo de pasioj, plene fondita sur humanecaj valoroj.

*Michel Schlup*

Eks-direktoro de la Publika kaj universitata biblioteko en Neuchâtel (BPU)

## **Fernand Donzé, la socialisto**

La du ankraj polusoj de Fernand Donzé en la socio nomiĝas « *La Bibli* » (signifanta *La Biblioteko*) kaj « *Les Socios* » (signifanta *La Socialistoj*).

Fernand aliĝis al la Social-demokrata Partio en 1953, la saman jaron kiel lia frato Willy en Ĝenevo. Kiel li mem diris : *Por juna intelektulo duon-aŭtodidakta for de sia infana eklezio, la partio simbolis plejbone la bezonon al pli justa mondo, pli bone organizita kaj pli respektama de la homa libereco.*

Oni povas situigi la plej fekundajn jarojn de la aktiveco de Fernand en la socialista partio inter 1956, dato de lia elekto al la Komunuma Parlamento, kaj la fino de la jaroj 70aj, kiam li estis la instiganto de la redaktado de libreto titolita ĝuste « *Les Socios* », kiu priskribas la historion de la sekcio de la socialista partio de La Chaux-de-Fonds ĝis 1979.

En la jaroj 50aj, antaŭ ol Fernand okupis estrajn funkciojn en la sino de la partio, li riĉigis la sekcion per siaj

kontaktoj kun famkonatoj de la franca socialismo, kiujn li venigis en La Chaux-de-Fonds. Estis André Philip en 1958, kiu brile analizis en la Popoldomo la politikan situacion en Francio la tagon mem kiam de Gaulle prenis la povon la 31an de majo. Poste estis Alain Savary, Daniel Mayer, Edouard Depreux. La plej bona memoro de Fernand restis la evento kiu ebligis al li realigi sintezon inter siaj konvinkoj kaj sia profesio : la ĉeesto la 22an de septembro 1959 de Vincent Auriol en la Popoldomo por inaŭguri ekspozicion organizitan de la PS (Partio Socialista), de la sindikatoj kaj de la kooperativoj kaj dediĉitan al la centjara naskiĝ-datreveno de Jaurès. La lasta majstra sukceso en tiu agadlinio estis, multe pli poste, la 29an de aprilo 1971, la renkontiĝo inter du maljunaj sinjoroj kiuj konfrontis siajn malsimilajn politikajn vojojn : la kontraŭ-stalina Jules Humbert-Droz kaj la kontraŭ-molleta Edouard Depreux, eminenta figuro de la PSU (franca Partio Socialista Unuiĝinta).

Kiel skribis Fernand, ili renkontiĝis plene sur la kampo de la rigoro intelekta kaj morala, kiuj faris el ili opoziciantojn el la interno en politikaj cirkonstancoj ŝajne sen rilatoj.

Mi retrovis la notojn, kiujn mi faris je la fino de tiu vespero, kiun mi ĉeestis kiel juna novaliĝintino al la PS: « Tio emociis min trinki glason kaj diskuti kun ulo kiu estis *« La Moskva Okulo »* kaj kun alia kiu estis ministro kaj ĝenerala sekretario de la PSU. Tiu Historio ankoraŭ vivanta impresas min: *Lénine, Staline, kaj Auriol, Mollet, de Gaulle, Mendès...* Ŝajnas al mi, ke kvazaŭ paĝoj de libro estas turnataj antaŭ mi. »



*Fernand Donzé en 1980  
(arkiva foto)*

Fernand, elektita deputito en la Kantona Parlamento en 1961, transprenis la prezidantecon de la kantona socialista partio en 1964 en dramaj cirkonstancoj, sekve al la morto subita

kaj neatendita, post operacio laŭdire banala, de lia amiko Marcel Berberat, la patro de Didier, kies malapero enigis la partion en konsternon. Kiel skribis René Meylan en la gazeto *La Sentinelle*, « *Fernand Donzé komprenis, ke li ne povas heziti. Li transprenis la lokon de sia mortinta amiko kaj, sen frazoj, eklaboris* ». Fernand prezidis la kantonan partion ĝis 1970. Estas sub lia prezidanteco ke la socialistoj subtenataj de siaj maldekstraj aliancanoj, akiris, per sia historia venko de 1965, sian duan elektiton ĉe la Ŝtata Plenuma Konsilio. Kelkaj riproĉis al Fernand, ke li ne mem sin riskis en la batalo. Sed por li, lia biblioteka laboro reprezentis absolutan prioritatecon kaj en tio li vidis sian disvolviĝon kaj sian socian utilon.

Post lia kantona prezidanteco, Fernand akceptis servi sian partion je la loka nivelo, kiel prezidanto de la sekcio de La Chaux-de-Fonds. Mi ne estas la sola, kiu konservas memoron iom nostalgian de tiu epoko kiam ni politikumis en bonhumoro, kie la kontraŭulo ne estis malamiko sed iu kun kiu oni povas lukti per gluo kaj penikoj farante nokte sovaĝan afiŝadon kaj poste kuntrinkante glason sen cedi ion ajn koncerne al la argumentado. Jen tio, kion tiurilate rakontas Fernand: « *Okaze de la balotadoj komunumaj de 1972 kaj kantonaj de 1973, ni revenis al satira kanzoneto. Laŭ konataj arioj disaŭdigitaj per megafonoj, ni provis aserti, ke niaj kontraŭuloj senvaloras, ke ni estas la plej bonaj kaj ke necesas voĉdoni blue...* Krome ni alkroĉis centojn da abeldometoj ĉe la arboj de la Podum fama kaj freŝa aprila nokto de 1973. Frue matene, Amélie kaj André

*Sandoz akceptis la tutan teamon de tiuj lacaj herooj kun cepa supo kaj fromaĝajn kuketojn.* » Tio estis miaj unuaj balotaj kampanjoj, ni estis bona teamo da gejunuloj kaj dank' al Fernand politiko ne ŝajnis al ni io enuiga, eĉ se ni taksis ĝin tre serioze.

Je la komenco de la jaroj 80aj, Fernand distanciĝis de la ĉaŭdefona PS sekve al sia translokiĝo en Les Brenets, kie li daŭre aktivis en la eteta sekcio de tiu vilaĝo. Li estis emerito okupita kiel la plimulto de la emeritoj, sed ne plu vera aktivulo. Tamen, dum ĉiuj tiuj lastaj jaroj li sintenis informema kaj daŭre entuziasmiĝis aŭ incitiĝis laŭ la eventoj. Dum tiuj lastaj jaroj, kiam ni renkontiĝis, ĉiufoje li demandis al mi novaĵojn pri la kamaradoj, pri la sekcio, li rakontigis min pri la kongresoj kaj aldonis sian vidpunkton. Neniam ĉe li lamentoj kiel « *je mia tempo* », sed ĝojaj rememoroj, des pli oftaj, ke la aĝo kaj la malsano fariĝis pli premaj. La lastan 4an de decembro ni intervjuis lin kun du junaj kamaradoj, por la arkivoj de la partio. Al la demandoj vastiĝantaj al la tuto de lia vivo kaj de lia agado, li respondis trafe, kun lucido, precizo, modesteco kaj la samaj konvinkoj.

En la diskuto, kiu sekvis, li diris al ni, ke li scias sian finon ne plu malproksima, sen bedaŭro, ĉar li havis belan vivon. Lastfoje kiam mi vidis lin, en la hospitalo de Couvet, li ankoraŭ kantetis al mi unu el niaj kanzonoj kaj ripetis, ke la vivo estas bela.

Konklude mi opinias, ke plejbone estas lasi al li la parolon. Jen kion li diras pri si mem en *Les Socios* : « *Mi praktikis ĉiujn profesiojn de la aktivulo : noktan gluadon de afiŝoj, redaktadon de flugfolioj kaj programoj, partoprenon en kunvenoj de komitatoj*

*kaj komisionoj, kantonan prezidentecon – li forgesis la lokan prezidentecon – vigligon de laborgrupoj, rikolton da subskriboj ĉe la pordoj aŭ surstrate, noktomezajn skoldadojn ĉirkaŭ lasta glaso, mandatojn ĉe la Komunuma Konsilantaro kaj la Kantona Parlamento, manifestadojn de la unua de majo aŭ laŭcirkonstancajn, provkandidatiĝon al la Nacia Konsilantaro, diskutojn oficialajn aŭ esplorajn, prezenton de gastoj, (...), eltrovon de kandidatoj, ktp. Mi ŝatis ĉion ĉi. Ĉe la socialistoj, fine, mi trovis min bone ; mia naturo paradokse samtempe avida je individua libereco kaj je engaĝiĝo por servo de postulema kaŭzo trovis sin tie komforta. Mi rifuzis plurfoje (...) la tentojn al politika posteno, preferante mian bibliotekistan profesion, kiu ankaŭ reprezentas manieron alproksimiĝi al siaj aliuloj.* »

Ni revenas al la komenco : *La Bibli* kaj *Les Socios*.

*Loyse Renaud Hunziker*



# Niaj legantoj komunikas

## Kultura vojaĝo en Vjetnamio

Nia abonantino kaj fidela amikino Luiza Carol rekomendas al ni ĉiuj la kurseton *Kultura vojaĝo en Vjetnamio*, ĉe edukado.net, en la paĝaro Klerigejo. Ŝi estas tre kontenta pri tiu sperto... kaj la « vojaĝo » ŝajnas al ŝi agrabla kaj ege interesa.

« La tuta kurseto kostas ne pli ol normala papera libro, sed pere de ĝi oni povas fari demandojn al la gvid-

antoj, babili kun la aliaj lernantoj ktp. Mi tutkore rekomendas ĝin al miaj geamikoj. Mi ne povos partopreni la UK-n en Hanojo, sed mi ĝojas, ke mi bonŝancas vojaĝi mense. Ju pli da aliĝontoj, des pli bone, ĉar tiu afero helpas al la vjetnama klubo varbi partoprenontojn por la UK. »

(Luiza, Israelo)

## Senlaca tradukisto kaj eldonisto

Willy Nüesch atingis sukcese la tradukon el la verko de Rudolf Steiner (1861-1925) de 28 titoloj sur 31 antaŭviditaj dum la lastaj 12 jaroj. Samtempe li ankaŭ tradukis kaj eldonis 12 verkojn el la germana literaturo (Goethe, Meyer, Morgenstern, Novalis, Schiller). Iuj estas multpaĝaj libroj, aliaj pli modestaj

broŝuroj. La plej nova eldono estas la membiografio de Steiner *Mia vivovojo* (332 paĝoj) kiu priskribas liajn devenon, studojn, laborojn, renkontojn kaj travivaĵojn ĝis la jaro 1913, antaŭ la fondo de la Antropozofia Societo, la konstruo de la Goeteanumo en Dornach kaj la tiea aktivado.

## Esperanto en GDR :

### Dokumenta kroniko pri malhelpita junularo

Esperanto malpermesita en GDR inter 1949 kaj 1965. Pri tiu nova atentinda libro en la germana de Torsten Bendias pri la Esperanto-

junularo en GDR estas rete legebla recenzo en esperanto de Andreas Künzli en : [www.planlingvoj.ch](http://www.planlingvoj.ch)

← Foto de François Gacond dum la postfestoj en La Sagne. Georgo Handzlik kantas konklude al sia monodramo « Ludoviko-Lazaro ».



Fotis François Gacond

**Talente gvidata de Elisabeth de Mestral la Svisa Koruso imponis per sia kanta kvalito kaj pianne Jean-Thierry von Büren, violonĉele Marion Bélisle, kaj flaŭte Andrée Gacond kaj Nancy Fontannaz ankaŭ feliĉigis kaj ĝojigis la festantojn.**



Fotis Stefano Keller



